

Bulgara Esperantisto

Februaro 1989



- 2 Ni pridiskutu! (Radoslav Paraškevov)
- 3 La societo — baza ĉelo de BEA (Dimităr Papazov)
- 4 Festo de „Bulgara Esperantisto“
- 5 Kvizo de nia revuo
- 6 El la malnovaj paĝoj (ADA, Penko Stoev)
- 8 Pri la naturo de Zamenhofa mondkoncepto (1879—1885) (Canko Murgin)
- 11 Memore al Tibor Sekelj
- 12 74-a Universala Kongreso de Esperanto (El „Esperanto“, n-ro 11/88)
- 13 La ekonomia agado ĉe BEA
- 14 „Esperanto malkovris al mi novan mondon“
- 15 BET en Sovetunio (Belka Beleva)
- 16 La Majstro
- 17 Poezio (Dragomir Šopov)
- 18 Beletro — Panta rey (Rada Dobrianova)
- 21 Salám alléjkuum (Georgi Miĥajlov)
- 23 Juna Esperantisto
- 27 Tra la mondo
- 29 Adresaro
- 30 Enlanda movado
- 32 Deziras korespondi
- III Distroj

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redaktoroj: Atanas ILKOV kaj Evgeni GEORGIEV

REDAKCIA KONSILANTARO: Dimităr HAĜIEV, Georgi MIĤAL-KOV, Krăstju KARUCIN, Kunĉo VĂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV.

Adreso de la redakcio: „Hristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86.

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio
Eldonkvanto: 6500 ekz.

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por aliaj landoj — 7.80 lv. Prezo de aparta numero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. gd.

Estas organizita regula registrado de la revuo sur magnetofonbendo por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Vladimir Dimitrov—la Majstro:
Junulinoj blankigas tolon.

Sur la lasta kovrilpaĝo: Vladimir Dimitrov—la Majstro:
Junulino el Kalotinci.

Ni bezonas tiujn dialogojn

● GASTE ĈE SOCIETO
„SUKCESO“ — VRACA

Jam estiĝas tradicio la gastadoj de nia redakcia teamo al diversaj enlandaj E-societoj. Tiuj renkontiĝoj kun legantoj estas por ni ne nur veraj festoj, sed horoj de bilanco de nia laboro. Dum tiuj horoj ni ankaŭ senpere ekscias pri la konkretaj deziroj kaj interesoj de niaj legantoj. Siaflanke ili informiĝas pri la specifeco de nia laboro, pri la proceso de naskiĝo de ĉiu numero. Fakte ni — legantoj kaj redakcio, interkonatiĝas pli intime kaj poste — per la revuaj paĝoj, komencas dialogi pli efike.

Pro tiuj kialoj ni kun plezuro akceptis la inviton de la esperantistoj el urbo Vraca, organizitaj en societo „Sukceso“. Ni dufoje prokrastis la renkontiĝon, atendante la aperon almenaŭ de kelkaj numeroj de la novformata „Bulgara Esperantisto“ kaj finfine, la 2-an de decembro 1988, nia redakcia grupo estis en Vraca.

Al la pridiskuto de la revuo venis ne nur esperantistoj el Vraca ĉe-kape kun sia doĵeno Radoslav Triĉkov, sed ankaŭ samideanoj el Bjala Slatina kaj Orjaĥovo. Ĉiuj subtenis la novan grafikan aranĝon de „BE“ kaj aprobis la variecon de ĝia enhavo. La pridiskutado de la revuo tuŝis ankaŭ gravajn problemojn de la enlanda movado. La pliparto de la ĉeestantoj (pli ol 30 personoj) faris eldirojn. Inter ili estis la societa prezidanto Stojan Pavunĉev, Ljubomir Trifonĉovski, Sneĵinka Angelova, Katja Marinova, Naĉeĉda Bosaŝka, Kiril Velkov, Radoslav Triĉkov, Vanka Jeljazkova.

En sia eldiro L. Trifonĉovski emfazis: „Sur la revuaj paĝoj devas konstante ĉeesti la temo pri disvolviĝo de niaj societoj post la renovigo de BEA. Ĉu ili estiĝis pli iniciate-

(Daŭrigo sur paĝo 7)



Jaro 58

N-ro 2

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

FOR LA IZOLIĜON !

Ĉiu ŝanĝo de strukturoj kaj metodoj povus alporti iujn negativajn postsekvajn, se oni — anticipe, aŭ dum la restrukturiĝo — ne entreprenas adekvatajn rimedojn. Jen estas kelkaj sugestoj:

La celo de la renovigo en BEA estas klara. Sed samtempe tute klara estas ia (mem)izoliĝo kaj silentiĝo de apartaj E-societoj. Ne gravas ĉu la kaŭzo estas malproksimeco de la Centro kaj manko de subinstancoj, aŭ la malnova kutimo atendi „de supre“ instrukcion, planon, instigon, ideon. Kompreneble, ĉio supre dirita koncernas precipe organizaĵojn, kiuj pro diversaj kialoj ankaŭ dum la pasinta periodo ne povis esti sufiĉe agemaj, memstaraj. La tiama distrikta estraro faris la eblon ilin helpi kaj aktivigi. Nun tiu faktoro mankas. Tiu manko devas esti plenigita — ĉe la novaj kondiĉoj. Kiamaniere?

La Centra Estraro de BEA havas je sia dispono sufiĉan kvanton da membroj, kies plimulto, ne pro sia kulpo, kunsidas nur 1—2-foje dum la jaro kaj revenas hejmen sen iu ajn kontribuo al la komuna afero. Ĉu en ĉiu pli granda aŭ malpli granda „regiono“ ne povus esti altirita voluntulo

el (aŭ ekster) la konsisto de CE por konkreta laboro? Lia celo estu: helpi la societojn kaj la Centran Estraron rilate gravajn kaj plenumendajn taskojn, informadi ambaŭdirekten, kunligadi la fortojn ktp. — nepre observante la principon de la loka memgvidado. La detaloj povas esti facile konkretigitaj.

Ekzistas delongaj tradicioj kontraŭ la izoliĝo kaj pasiveco: intersocietaj, regionaj kaj enlandaj konferencoj, kunvenoj, interŝanĝo de sperto, komunaj ekskursoj, amuzaj vesperoj, festenoj. Ĉe la nunaj cirkonstancoj tiuj formoj estas nepre efektividaj. Sed kiamaniere?

Nediskutebla fakto estas, ke la jarprogramo de tiuj aranĝoj por 1988 estis tre streĉa, dense „loĝigita“. Vidu ekzemple la liston por oktobro kaj vi trovos tie „nur“ 10 entreprenojn. Tio ne nur cerbumigas vin kien iri. Ĝi dispartigas la fortojn, kondukas al nesufiĉa partopreno en iuj aranĝoj kaj sekve — al nekontentiga rezulto. Oni povus demandi sin: ĉu la reguligo kontraŭas al la demokratiigo?

Vi, kara leganto, vizitis ekzemple la Pedagogian Konferencon en Sofio aŭ

PARĖ en Borovo, la MEM-renkontiĝon en Samokov aŭ la jubilean feston en Ŝumen. Vi faris vian komparon kaj konkludon. Eble denove en via konscio reliefigis la postuloj pri bonkvalita preparo de ĉio, kion ni faras. Oni devas serioze pripensi ĉiujn detalojn. Se, ekzemple, estas konferenco, efektive modera tagordon, sen longegaj predikoj, por ke la enhavo restu bonefike en la kapoj de la ĉeestantoj. Prizorgu anticipe la loĝigon, la nutradon kaj ne faru tion, kiam la gastoj

jam alvenadas. Nepre preparu bonan, varian distran programon — ja plimultiĝas la juna esperantista anaro kaj ankaŭ la ne tiel junaj emas danci, ŝerci, kanti. Jam ne plu estas loko por porokaza amatoreco kaj vana strebo al dommastra gloro, ne subtenata de celkonscia, serioza laboro.

Ŝultro ĉe ŝultro, kune, aktive senĉese — al la celo!

Hristo MANOLOV

NI PRIDISKUTU!

Parolante pri la okupateco de la membroj de CE de BEA mi menciis, ke la plimulto el ili (sufiĉe spertaj kaj kapablaj homoj) estas estraranoj de diversaj asociaj gvidorganoj. Ĝuste ili obstine kaj sindone laboras por la prospero de Esperanto en nia lando kaj eksterlande. Sed eble nur ili ne sufiĉas. Evidentas, ke la esperantistaj societoj bezonas efikan kaj kompetentan helpon. Kaj ĝin povos doni ne nur estraranoj kaj membroj de CE de BEA sed ankaŭ volontuloj, kiuj kapablas fari tion. Tamen ne sufiĉas nur la kapablo, oni devas havi ankaŭ deziron kaj tempon por tio. Lige kun tio la aktivuloj devas turni sin al la Esperanto-societoj, aŭ al la komisionoj ĉe CE de BEA. Kaj siaflanke la gvidorganoj de BEA devas zorgi pri elektado de siaj kadroj. Finfine kial do ni devas atendi, ke oni „de supre“ diru al ni kion ni devas fari? Ja estas nia devo labori por Esperanto — se, kompreneble, ni estas veraj esperantistoj.

La Organiza Komisiono ĉe BEA pretas subteni ĉiujn, kiuj celas la prosperon de nia asocio.

Ĉu „izoliĝo“ estas la ĝusta vorto? Ja temas nur pri apartaj E-societoj. Kaj ĉu la „izoliĝo“ de tiuj societoj estas postsekvo de la nova strukturo de BEA? Mi dubas!

Vere ekzistas problemoj kaj la periodo de „silentiĝo“ de iuj esperantistaj societoj jam longe daŭras. Tio laŭ mi dependas de la aktiveco kaj kapablo de la apartaj estraranoj kaj societanoj labori en la nova situacio. Krome, memkompreneblas, ke problemoj ekzistas tie, kie oni laboras — ne grave ĉu bone aŭ malpli bone.

Generale mi samopinias kun nia estimata samideano Hristo Manolov. La problemojn de li tuŝitajn en lia artikolo ni speciale diskutis dum la lasta kunsido de la Komisiono pri Organiza Agado, kies membro estas ankaŭ li mem.

Tio estas mia opinio pri la tuŝitaj de samideano Manolov problemoj. Estas bone, ke ni aŭskultu pli multajn opiniojn. Sed eble plej bone estos, se ni turnos pli da atento al praktika laboro por solvo de la problemoj.

Radoslav PARAŜKEVOV,
Sekretario de la Organiza
Komisiono ĉe BEA

Noto de „BE“. La Redakcio memorigas al siaj legantoj, ke n-ro 5/1989 de „Bulgara Esperantisto“ estos dediĉita al la temo „Mi kaj mia E-societo“. Al tiu temo respondas la supre publikigitaj opinioj kaj ankaŭ la artikolo de la Ĝenerala Sekretario de BEA Dimităr Papazov sub titolo: „La societo — baza ĉelo de BEA“.

La societo — baza ĉelo de BEA

La plenkunsido de CE de BEA de la 16-a de januaro 1988 metis novajn kaj respondecajn taskojn antaŭ la esperantaj societoj. Ilia rolo kreskos ĉiam pli kaj pli en la kondiĉoj de la memregado. La societoj kune kun siaj kluboj estiĝas centro de la Esperanta aktivado. Laŭ la statuto, ankaŭ nun, kiel antaŭe, ili organiziĝas ĉe esto de almenaŭ 4 aŭ 5 personoj, scipovantaj aŭ studentaj Esperanton. Oni povas organizi esperantajn societojn ne nur en la komunumaj centroj, sed ankaŭ en aliaj urboj kaj vilaĝoj, kiuj estas plene aŭtonomaj kaj egalaj al la ceteraj societoj. En ĉiu loĝloko povas ekzisti nur unu societo. La membrado en la societoj okazas laŭ loĝado. Sammaniere okazas la membrado ankaŭ en Sofio. Se en iu komunumo ne ekzistas esperantista societo, la esperantistoj membras en la societo de la plej proksima najbara komunumo. La societoj kontaktas rekte kun CE de BEA. Departementaj kaj komunumaj estraroj ne estas elektataj. La societoj elektas sian societatan estraron, kies nombro dependas de la decido de la membroj.

Kutime la kasisto kolektas membrokotizon surloke, sed por faciligi la homojn en pli grandaj societoj ĝi povas esti kolektata ankaŭ en la klubejoj kaj transdonata al la kasisto. La membrokotizo restas plene je dispono de la societo. Ekde 1989, ĉe ĝia kolektado oni uzos specialajn kvitancarojn, vizitajn en CE de BEA, kiujn post plenigo oni devos redoni en ĝia kancelario. Se ekzistas kondiĉoj pri tio, ĉe la societoj oni povas organizi klubojn laŭ profesioj kaj intereso.

Per decido de la plenkunsido de CE de BEA estis

organizitaj Esperantaj Domoj de Kulturo (EDK), kaj estis ellaborita regularo pri ilia agado. Oni aŭtaŭvidis, ke ili disvolvu kulturen aktivadon kaj donu metodikan helpon ne nur al la societoj, sur kies teritorio ili funkcias, sed ankaŭ al ĉiuj ceteraj societoj en la departemento. Kompreneble, ankaŭ en lokoj, kie ekzistas EDK la societoj devas zorgi pri sia kultura laboro. La EDK organizos pli grandskalajn iniciatojn precipe kun neesperanta publiko, kaj la E-societoj disvolvos sian konkretan laboron helpe de la Domo.

Atestilo pri membrado en la E-societo estas la membrokartoj. Rajtigita de la societo persono ricevas la membrokartojn senpage de CE de BEA, kaj vendas ilin al la membroj. La enspezo restas por la societo. Ĉiujare, laŭ direktivo de CE, oni preparas buĝeton kaj sendas ĝin al la Buroo de CE por aprobo. La societa kunveno rajtas fari ŝanĝojn enkadre de la aprobita buĝeto. Oficvojaĝoj al Sofio kaj en la lando okazas per decido de CE, konforme al la Instrukcio pri la oficvojaĝoj.

Ĉiu membro de BEA rajtas membri nur en unu societo.

Konforme al la decido de la plenkunsido de CE de BEA de la 16-a de januaro 1988, la farendaj ŝanĝoj en la organiza vivo de la societoj ne estas grandaj. Plej seriozaj ŝanĝoj devas ekesti en la enhavo kaj esenco de la societa aktivado. Rezulte la societoj devas estiĝi loko por ĉiufankaj esperantistaj manifestiĝoj.

Dimităr PAPAŬOV,
Generala Sekretario de BEA



Partoprenantoj en la Festivalo de E-Parolo kaj Kanto „Loznica'88”.

FESTO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

En 1989 revuo „Bulgara Esperantisto“ fariĝas 70-jara.

La solena celebrado okazos de la 22-a ĝis 24-a de septembro ĉi-jare enkadre de la aranĝo „Tra arbaroj kaj kamparoj“ en urbo Velingrad.



LA ARANĜO

La dektaga turista aranĝo „Tra arbaroj kaj kamparoj“, organizita de E-societo „Stoju Kalpazanov“ — Velingrad, jam fariĝis bona tradicio. Ĝi havas lokon en tiu urbo ĉiujare ekde 1974. En ĝi krom bulgaroj partoprenas ankaŭ Esperanto-grupoj el Sovetunio, Ĉeĥoslovakio, GDR, Grekio kaj Pollando. La ĉi-jara renkontiĝo okazos de la 18-a ĝis la 28-a de septembro.


La programo inkludas ĉiutagajn sunbanojn, promenadojn en la pitoreska naturo de Rodopi-montaro, mineralakvan terapion, lingvoperfektigon. La partoprenantoj ekskursos al la Rila-monaĥejo kaj al la historia urbo Batak, vizitos la ekzekutlokon de la esperantistoj-antifaŝistoj Vela Peeva kaj Stoju Kalpazanov.

Ne mankos amuzvesperoj, diskoteko, bulgara gastamo.

LA URBO

En la okcidenta parto de la pitoreska Ĉepino-valo brilas unu el la perloj de la bulgara sudo — Velingrad, kiu portas la nomon de Vela Peeva.

Velingrad estas internacie konata kuraca kaj turisma bazo, situanta 770 m super la marnivelo. Ĝi dronas en oceano de sanigaj koniferaj arbaroj. En la urbo estas pli ol 70 diverstemperaturaj kuracaj termofontoj.



LA FESTO

Kiel ni jam menciis, la Festo de „Bulgara Esperantisto” okazos septembre ĉi-jare, kadre de la aranĝo „Tra arbaroj kaj kamparoj”. La solenan kunvenon ĉeestos eksĉefredaktoroj de „BE”, ĵurnalistoj, gastoj el eksterlando. Oni havos la eblecon

pridiskuti ankaŭ la temon „La Esperanta ĵurnalismo — faktoro en nia movado”. La organizantoj antaŭvidas renkontiĝojn kun legantoj de nia revuo.

Dum la festo aĉeteblos revuoj kaj libroj. Krome, estos organizita speciala vetkurado por la premio de „BE”.

Pliajn informojn petu de: inĝ. Boris Gaĝanov, str. Petâr Janev 21, Velingrad, BG — 4600.

Lasta dato por aliĝo: 15-a de aŭgusto 1989.

Kvizo de nia revuo

Okaze de la jubileo de nia revuo „Bulgara Esperantisto” la redakcio organizas kvizon. Niaj legantoj, kiuj respondos bone minimume al tri el la ses demandoj, partopre-

nos lotumadon de ses libropremioj. La respondojn ni atendas ĝis la 15-a de septembro 1989.

La rezultoj de la kvizo kaj la gajnintoj de la premioj estos anoncitaj dum

la festo de revuo „Bulgara Esperantisto”, kiu okazos septembre en urbo Velingrad. Detalaj informoj pri tiu evento aperos sur la paĝoj de la revuo.

„BE”

1. En la komenca periodo de Esperanto elstara eksterlanda revuo propagandis ĝin. De ĝi la bulgaraj legantoj unue eksciis pri Esperanto kaj ties iniciatinto. Kiu estas tiu revuo?

2. Krom la Ministerio de Popola Instruado, ĉu alia ministerio en la dudekaj jaroj de nia jarcento permesis fakultativan lernadon de Esperanto?

3. En 1919 komencis aperadi revuo „Bulgara Esperantisto”. Ĉu vi scias la proprajn kaj familiajn nomojn de la triopo, kiu redaktis ĝin?

4. En kiu jaro per dekreto oni nuligis la lernantajn organizaĵojn kaj BEA fermis la kursojn de Esperanto por lernantoj kaj malpermesis ricevi kaj disvastigi la revuojn „Bulgara Esperantisto” kaj „Esperantista Junularo”?

5. En kiu jaro por unua fojo komenciĝis Esperanto-disaŭdigoj de la radiostacioj Sofio, Varna kaj Stara Zagora?

6. Ĉu nur revuo „Bulgara Esperantisto” estis oficiala organo de Bulgara Esperantista Asocio?

La konsiloj de ADA

Estus tre utile, se la nuna esperantista generacio de tempo al tempo foliumadus malnovajn E-librojn, revuojn, gazetojn kaj bultenojn. Oni ekscius multajn interesajn faktojn, pensojn kaj eldirojn de niaj iamaj entuziasmaj kaj aktivaj esperantistoj, kiuj multe laboris por kaj per Esperanto en treege malfacilaj kondiĉoj kaj akiris grandan sperton.

Ĉi-sube ni proponas al via atento pensojn kaj konsilojn de la elstara esperantisto Atanas D. Atanasov — ADA, ĉerpitajn el lia verko „El la intima libro de la verd-urbaj esperantistoj“, kiu havas subtitolon „Skizoj el la esperantista vivo“, eldonita en 1927.

Multaj malamikoj de Esperanto delonge mortis kaj malaperis. Esperanto tamen restis — ĉiam pli forta, ĉiam pli progresanta. Kiam malamikoj kontraŭbatalas, memoru, ke ankaŭ ilin Esperanto postvivis.

La venko de Esperanto en la mondo certe ne venos tiel rapide, kiel supozas kelkiuj tro entuziasmaj esperantistoj. Sed kiam la venko venos, tiam certe tio estos pli ol venko de lingvo.

La hazardaj elementoj en la Esperanto-movado estas balasto, kiu portas pli da malutilo ol da utilo. Ili kreas la trompan kredon pri kvanta forto kaj per tio povas decidigi riskan entreprenon, kiu postulas nur seriozajn subtenantojn.

La vera ideeco estas ekkonebla en la momento, kiam la afero tuŝas la monujon.

Ĝis tiu momento ĉiu aplomba parolo pri la ideo estas sen-

signifa deklamo.

La Esperanto-movado ŝuldas siajn sukcesojn al personoj, kiuj preferis mem labori, por krei sukcesojn, ol atendi sukcesojn de aliaj.

Vera Esperanto-aganto estas tiu, kiu estas preta daŭrigi sian laboron eĉ se li vidus sin tute sola sub la verda standardo, post kiam li estis jam sekvita de granda anaro.

Ne trotaksu la movadon, por ne trosenti elreviĝon.

Ne estas bona esperantisto tiu, kiu aliĝis al Esperanto nur pro ĝiaj sukcesoj. Fidinda estas nur tiu, kiu aliĝas por krei sukcesojn.

Esperanto ne bezonas tiun, kiu ne bezonas Esperanton.

Ne diru: „kial tio ne estas an-

korau kreita en Esperanto“, „kial tiu aŭ alia verko ne estas ankoraŭ tradukita“, „kial la esperantistoj ne havas ankoraŭ tion aŭ tion“ k. t. p.

Kio ne ankoraŭ estas farata, ĝi estos de ni farita.

Ja por tio ni estas en la movado!

La entreprenoj iniciatitaj devas uzi la efektivan forton de la movado — alie ili fiaskos.

Bona propagandisto devas scii, kiam li ne devas respondi al atakoj.

Pli facile estas varbi kvindek novajn esperantistojn, ol realtiri al la movado unu malnovan elrevigitan fervorulon.

Ofte estas pli malfacile savi Esperanton de malsperta defendo, ol de akra atako.

Ne povas esti bona esperantisto tiu, kiu povas preterpasi sur la strato egalanime renkontitan verdstelulon.

Du specojn de esperantistoj mi vidis: unuj zorgas antaŭ ĉio ellerni bone la lingvon, aliaj zorgas unue gvidi la movadon, eĉ antaŭ ol posedi la lingvon. Vi mem, leganto, al kiu speco apartenas?

Unu leciono de Esperanto

Pro kaŭzoj, kiujn mi konigis al gvidantoj de Bulgara Esperantista Societo, tiun ĉi jaron, enskribiĝis nur dek du lernantoj inter la VI-klasanoj de Plovdiva knaba gimnazio, por lerni Esperanton. Tamen tiu kvanto da lernantoj permesas al mi okupiĝi ofte kaj serioze kun ĉiu el ili aparte en ekzercado dum la instruado de la lingvo, kaj per tio, mi (pardonu pri la malmolesteco) atingis ĝojigan rezulton.

Ĉar en la momento, kiam komenciĝis la instruado de Esperanto, la lernolibroj espe-

rantaj de nia agema ADA estis elĉerpitaj, mi estis devigita servi al mi en la lecionoj per Kursa lernolibro de Ed. Privat. Bonaj lernolibroj — precipe kiam uzas ilin Esperanto-lernantoj, gvidataj de instruisto. Instruo kaj lernado iris bone. La laboro de la instruisto estas agrabla. La intereso de la lernantoj pri Esperanto ĝenerale estas granda.

Unu belan tagon alvenis en la gimnazion ministeria revizoro pri lingvoinstruado, s-ro D-ro Slavĉev. Ekdeziris li, ke li kaj la direk-

toro gimnazia s-ro Spasov ĉeestu en mia klaso dum Esperanta leciono. Ili eniris, kiam mi ĵus estis leviginta lernanton por lin ekzameni. Silente ili lokiĝis inter la lernantoj; mi enmanigis al ili po ekzemplero de la nomita „kursa lernolibro“, kaj samtempe mi ilin atentigis pri la paĝo legata. Estis „La historio de la homaro“. La lernanto legis kaj tradukis parton de la rakonto; la revizantoj atente sekvis. Mi levigis alian lernanton, kaj fermiginte lian lernilon, mi mem daŭrigis legi, la lernanto nur bulgaren tradukis; venis tria lernanto antaŭ la nigran tabulon. Mi diktis al li Esperantan tekston; li skribis ĝin kaj tradukis. Mi starigis kvaran, kvinan... preskaŭ ĉiujn. Kun ili mi nur esperante parolis kaj esperante komentariis la

enhavon de la legitaj tekstoj (precipe la rakontoj). Pro la sukceso, kiun mi havis (mi ripetas, — pardonu pri la malmolesteco) mi entuziasmiĝis, kaj preskaŭ forgesis, ke inter la lernantoj sur la benkoj estas revizantoj. Eksonoris la sonorilo. La revizoro kaj lernejdirektoro leviĝis. Ili ambaŭ alproksimiĝis al mi, premis mian manon, kaj s-ro revizoro aldonis: „Mi estas tre kontenta, sinjoro, mi vin salutas. Vi laboras tre bone kun viaj lernantoj“. Ĝenerale de la esperanta instruado en Plovdiv (li aludis ankaŭ la knabinan gimnazion), mi estas tre kontenta!“

Plovdiv, 23.II.1923

Esperanta lektoro:
Penko STOEV
(„BE“ n-ro 8/1923)

NI BEZONAS TIUJN DIALOGOJN



maj, pli viglaj, ĉu iuj el ili malsanas kaj kial? Ĉu ili bezonas helpon? Alia interesa temo estas la agado de la asociaj sekcioj kaj kiel ili laboras kun siaj kluboj.“

La opiniojn oni povas ordigi en kelkaj grupoj. La ĉeestantoj rekomendis pli oftan publikigon de scienc-popularaj artikoloj kaj de artikoloj dediĉitaj al aplikado de Esperanto en la ĉiutaga praktiko, en profesioj, en scienco. Tiurilate oni su-

gestis utiligon de la profesia sperto de esperantistoj — sciencistoj kaj fakuloj.

Ankaŭ estis proponita speciala rubriko por komencantaj esperantistoj. Ne estis forgesita la riĉa sperto de la veteranoj kaj oni proponis pli oftan aperigon de iliaj artikoloj kun konkretaj kaj praktikaj konsiloj.

Ege interesa estis la ideo de Vanja Ĵeljazkova pri publikigo en la revuo de rubriko „Verda kalendaro de nia movado“. Per ĝi ni memorigos pri interesaj eventoj, pri gravaj datoj kaj rimarkindaj personoj de nia mova-

do. Estis lanĉitaj ankoraŭ kelkaj originalaj ideoj, kiujn la redakcio nepre konsideros.

Konklude — ni sincere dankas al la dommastroj ne nur pro ilia kora gastamo, sed ankaŭ pro iliaj valoraj proponoj kaj sugestoj, kiuj multe helpas nian estontan laboron.

En la redakcion jam venis ankoraŭ kelkaj invitoj pri renkontiĝoj kun E-societoj. Ni kun ĝojo akceptas ilin, ĉar tiujn dialogojn bezonas kaj niaj legantoj, kaj la redakcianoj mem!

Maria JANKOVA

Pri la naturo de Zamenhofa mondkoncepto (1879—1885)

Canko MURGIN

ESEO II

4. Revolucia krizo en Rusio (1879—1881).

Unua granda ondo de pogromoj (de aprilo 1881 ĝis junio 1882): Dum la periodo 1879—1881 estiĝis revolucia krizo en Rusio. Caro Aleksandro la Dua estis sekrete kondamnita (en aŭgusto 1897) je morto fare de la nemarksisma, etburĝe revolucia (kaj socialisma) movado **Narodnaja Volja** (Popola Libereco). Tiun kondamnon oni plenumis per bomba atenco (en marto 1881).

La murdo de caro Aleksandro la Dua iĝis konvena preteksto, por ke la rusa dinastio, kune kun nobeloj, altaj korteganoj, riĉuloj kaj gvidaj personoj el la administracio (centra kaj loka), provoku longan serion de pogromoj kontraŭ la revoluciuloj, plejparte rusoj, sed ankaŭ kontraŭ la minoritatoj, precipe la **hebrea** en la teritorio de Rusio, de Ukrainio (Ĥarkovo, Kievo k. a.), de Pollando (Varsovio, Bjalistoko k. a.), de Litovio k. a. en daŭro de pli ol unu jaro (ekde aprilo 1881 ĝis junio 1882), t. e. en daŭro de 15 monatoj. Multaj, inkluzive Zamenhof, estis erarigitaj. La ege bedaŭrindaj sang-buĉadoj kontraŭ senkulpaj homoj en Rusio efikis tre negative sur la impresigeman animon de la studento Zamenhof, kaj li facile fariĝis viktimo de la cionismo (hebrea naciismo).

5. Akra diskuto pri la direkto de elmigrado:

Kiel rimedo kontraŭ pogromoj kaj diversspecaj punoj, persekutoj aperis la propono pri elmigrado kiel savo el la despotismo de cara Rusio. La propono mem kreis dilemon: Kien elmigri?

La progresema plimulto pledis por Usono — lando kun grandaj loĝigeblecoj, kun alta prestiĝo, kun potenco influo inter la tiutempaj laboristaro, etbienuloj, metiistoj, etkomercistoj kaj intelektuloj en Eŭropo pro la liberiga kaj revolucia gloro, kiun tiu lando gajnis dum la intercivitana milito de la Usona Nordo kontraŭ la Usona Sudo por neniigo de la socia reakcio kaj de la sklaveco de negroj (1861—1865). Tiutempe ankaŭ freŝis la memoro pri tiuj revoluciaj eventoj. Oni eĉ fabele rakontadis, ke Karlo Marks (1818—1883) kaj la Ĝenerala Konsilio de la Unua Internacio (1864—1876) sendis longan gratul-leteron (1864) al la Prezidento de Usono — Abrahamo Lincoln (Lincoln), (1809—1865). Ili esprimis siajn grandajn estimon kaj simpatiojn, siajn helpojn kaj subtenojn (moralan kaj alian) al la sentimaj batalantoj kontraŭ la socia reakcio, kontraŭ la sklaveco de la negroj en la Sudo de Usono.

La malplimulto de hebreoj, plejparte sub influo de la cionistklerikaj rondoj senlace agitadis por elmigro al Palestino, al la sanktaj bordoj de rivero Jordano.

En hebrea gazeto „Razsvet” (Tagiĝo, Matenruĝo), eldonata en Peterburgo (1879—1883), mallonga


artikol-pledo malfermis grandan diskuton pri elmigro al Usono. Sekvis la plej ampleksa, el ĉiu vidpunkto, pledo de Zamenhof „Kion fari, finfine?” („Razsvet”, N-roj 2, 3, 4 de 12-a, 15-a, 22-a de januaro kaj n-ro 5 de 1-a de februaro 1882). Zamenhof evidentiĝis la avantaĝojn pri elmigro al Usono, al la „liberaj bordoj de (rivero) Misisipo”.

La cionistoj kaj la hebreaj klerikoj komencis informan kanonadon kontraŭ elmigro al Usono, insistante pri elmigro nur al Palestino.

Studenta Rondeto pri Esploro de la Hebrea Demando (en Varsovio), konsistanta el hebreoj el Litovio kaj u. Bjalistoko, kaj gvidata de studento Zamenhof, en speciala kunveno (februaro 1882) rekomendis elmigranton al Palestino. Zamenhof estis kontraŭ, sed finfine li erare decidis obei la volon de la plimulto. Per tiel „unuanima” decido de la Studenta Rondeto (pri elmigro al Palestino), tiu organizo fariĝis cionista (en februaro 1882). Ekde tiu momento Zamenhof kalkulas sian membrecon en cionismo. Kaj en la sekva monato li aperigas novan artikolon „Sub Komuna Standardo” („Razsvet”, n-ro 13 de 26-a de marto 1882). Tiu fojon Zamenhof pledas por elmigro ne al Usono, sed al Palestino, prapatrio de la hebreoj, lando kun sanktaj lokoj por hebreoj. Evidente, Zamenhof kaj liaj kolegoj el Studenta Rondeto estis kolektive disorientitaj.

6. Zamenhof en kaptiteco de cionistoj (de februaro 1882 ĝis aŭgusto 1885). **Preparlaboroj por elmigrado al Palestino:** Kiamaniere Zamenhof kaj liaj kolegoj el la Universitato falis facile kaj rapide al la fundo de cionista abismo? Pro la longtempa daŭro de okazantaj pogromoj (de aprilo 1881 ĝis junio 1882) kaj pro manko de efektiva kono pri esenco de la pogromoj la cionismo vigliĝis, kreskis kaj vastigis sian venenan influon. Zamenhof kaj liaj kolegoj el la Studenta Rondeto estis submetitaj al enorma psika premo fare de la cionista ŝovinismo, kiu venis el Vilno kaj Kovno, el Bjalistoko kaj Minsko, el Ĥarkovo kaj Kievo, sed ne malpli ankaŭ el Varsovio mem. Speciale mi devas emfazi, ke Zamenhof kaj lia Rondeto havis intensajn kontaktojn kaj kunlaboron kun Studenta Rondeto en Ĥarkovo, Ukrainio (fondita: 1882.01.21; laŭ malnovstila kalendaro — laŭ m. s. k.). Tiu Rondeto en Ĥarkovo estis dekomence cionista kaj plej frue fondita en la tuta Rusio. Ĝi havis filiojn en Ukrainio kaj eĉ ekster ties limoj. Bedaŭrinde, mi ne havas informon ĉu la Studenta Rondeto en Varsovio estis filio de la Ĥarkova Studenta Rondeto aŭ estis memstara organizo. Plurmembra delegitaro el Ĥarkovo vizitis Varsovio, agitis kaj varbis elmigrontojn nur al Palestino. Tiu delegitaro havis specialan renkontiĝon kun Zamenhof kaj la Varsovia Studenta Rondeto. Oni scias nun tute precize, ke Zamenhof promesis elmigri (1882).

En la cionisma movado Zamenhof aktive partoprenis ne nur kiel gvidanto de la Studenta Rondeto en



„Portreto“. Aŭtoro Ivan V. IVANOV, membro de Sofia Kino-Foto Klubo „Verda Objektivo“. La klubo gajnis la grandan kolektivan premion „Arĝenta Kolombo“ en la konkurso, enkadre de Dua ILEF-Festivalo en Vraca, 1988.

Varsovio, (kiu fariĝis cionista organizo en februaro 1882), sed ankaŭ kiel kolektanto de mono por subteni la elmigradon de hebreoj al Palestino. Fine de ĉiu monato, li transferis* la kolektitan monon al A. Salvendi, rabeno en Dürckheim (Germanio), kiu estis internacia kolektanto de mono por elmigrontoj al Palestino. La ricevon de transferita mono tiu rabeno kvitanças per aperigo de Listo de kontribuintoj en la Suplementoj de du gazetoj — „Jüdische Presse“ (en Berlino) kaj „Israelit“ (en Mainz, Germanio). La nomoj en ĉiu Listo estas laŭ alfabeto kaj post ĉiu nomo sekvas la preciza monsumo, kiun tiu bonvolis donaci en la kurrenta monato. Zamenhof transferis dekojn da tiaj kolektivaj monsumoj kaj samtempe en aparta sendaĵo li ekspedis tiom da Listoj de Kontribuintoj por publikigo.

Laŭ la tiutempa rusa financa leĝo ĉiu rajtis transferi nelimigitan kvanton da propra mono, sed neniu rajtis, sen aparta permeso, sendi kolektivajn monon. Do, transferante kolektivajn monon kaj sendante Listojn de Kontribuintoj en eksterlandon (Germanio), Zamenhof kun plena konscio pekis kontraŭ la leĝo, riskante ĉiunmonate esti punita pro manko de lojaleco. Tamen, Zamenhof sciis, ke tiu risko ne daŭros longe, ĉar li mem esperis baldaŭ elmigri al Palestino.

Feliĉe, la cionisma periodo (ekde februaro 1882 ĝis aŭgusto 1888) en la vivo de Zamenhof ne daŭris longe. Zamenhof mem konfesas (en 1905—1907), ke li estis cionisto nur dum tri jaroj kaj duono. Bedaŭrinde, pluraj esploristoj kaj verkistoj de rememoroj neglektis kaj iuj eĉ (absolute) ignoris tiujn aŭtentajn informojn (1905, 1907) de (kaj pri) Zamenhof kaj ili fojfoje arbitre plilongigas tiun periodon de tri kaj duono da jaroj al kvin, eĉ al deko(j) da jaroj. Tia klopodo, sendepende de la konsideroj, estas falsiga kaj senbaza, negative tendenca, kaj vole-nevole ofendas la honoron kaj la honestecon de Zamenhof.

7. Dubo kaj hezitado de Zamenhof pro plua restado ĉe cionistoj: La 13-an de junio 1882 okazis kunveno de hebreaj plenkreskuloj en Varsovio por starigi propran organizon pri aferoj de elmigro. Zamenhof kaj liaj kolegoj el la Studenta Rondeto ankaŭ partoprenis tiun kunvenon, memorindan pro skandalaj disputoj. Ripetiĝis la kolizio inter la du konceptoj: Ĉu elmigri al Palestino, ĉu al Usono? La amaso de kunvenintoj strikte disdistingis je du ampleksaj frakcioj, diametre kontraŭstarantaj unu al la alia. La atendata starigo de organizo ne okazis. Ĝi estis prokrastita por unu monato. Tiu ekscita diskuto vekis ĉe Zamenhof internan konfuzon. Li iom ekdubis pri la praveco de sia aliĝo al la cionisma movado. Intertempe, en junio 1882, la unua grupo de elmigrantoj, organizita de Ĥarkovo, forveturis al Palestino. Zamenhof prokrastis sian elmigron. Tio estas simptomo pri lia eventuala retiriĝo de la cionisma movado.

Meze de junio 1882 la hebreaj plenkreskuloj denove kunvenis jam konkrete por starigi la prokrastitan organizon. Zamenhof kaj liaj kolegoj el la Studenta Rondeto ankaŭ estis tie. Tamen jam ekde la komenco la kunvenintoj okazigis du paralelajn kaj memstarajn fondkunvenojn. Estis fonditaj du konkurantaj organizoj: (a) cionist-klerikala (de palestinistoj) kaj (b) demokrati-klerisma (de usonistoj). Zamenhof estis kunfondinto de la cionist-klerikala organizo kaj estis elektita en ties Estraro. Per sia partopreno en la fond-

kunveno de cionistoj kaj klerikoj Zamenhof demonstris renovigitan ŝaton al la reakcia tendaro inter la hebreoj, des pli ĉar li ricevis plian gvidpostenon en la Estraro de tiu nova organizo. En Zamenhof aperis perioda hezitado. Jen „disde“, jen „al“ cionist-klerikala organizo de plenkreskuloj. Kaj tio plu daŭris alterne.

La 18-an de aŭgusto 1882, la cionista Studenta Rondeto oficiale aliĝis al la cionist-klerikala organizo de palestinistoj. Tiamaniere la Rondetomemlikvidiĝis kaj Zamenhof estis feliĉa „perdi“ la gvidpostenon (prezidanto de cionista Studenta Rondeto) en cionisma movado kaj ĉio ĉi estas nova etapo de „al“ kaj „disde“ la cionismo kiel tuto. La hezitado de Zamenhof fariĝis kronika. Zamenhof, kiel multaj aliaj hebreoj, senpacience atendis informon pri starigo de unua hebrea kolonio fare de la grupo forveturinta en junio 1882, sed tiu informo ne venis dum jaroj. Estis malfacilege fondi kolonion en Palestino. Tial la kreskantaj konfuzo kaj dubo obsedis kaj disrevigis la dezirantojn elmigri al Palestino. En tiaj cirkonstancoj Zamenhof refondis la Studentan Rondeton pri Esploro de la Hebrea Demando kiel nepolitika organizo. Kaj la Rondeto revenante al sia esplora laboro decidis sendi kolektivajn leteron al la verkisto (kaj socialisto) I. L. Levin (pseŭdonomo: N. Jehalel, 1844—1925), hebreo el Litovio, sed loĝanta en Kievo, Ukrainio. Jen estas la kompleta teksto:

„La mizera stato de la hebreoj vekis ĉe la juda junularo simpatio kaj intereson por sia popolo. Sed la junuloj de Varsovio, precipe el la klerulaj familioj, estas indiferentaj pri tiu ĉi demando. Ili rigardas sin kiel poloj kun juda religio. Do ni, 'litovaj judoj' en Varsovio, havas devon vekigi ĉe ili simpatio por nia popolo. Tial ni fondis ĉi tie studrondon por la juda demando kaj ni volas ĝin pritrakti serioze. Ni turnas nin al vi kun la peto klarigi al ni vian vidpunkton en ĉi tiu demando, por ke ni havu materialon por traktado“ (1882.11.21; laŭ m. s. k.).

Tiu ĉi letero, kvankam verkita kaj subskribita de la studento Zamenhof, estas subskribita ankaŭ de pluraj anoj de la Studenta Rondeto. Speciale por Zamenhof ĝi havis kaj pozitivan, kaj negativan influojn: (a) **Tio estas la unua konkrete konata okazo, kiam Zamenhof parte ekinteresiĝis pri socialismo (tiamaniere), des pli ĉar la poeto-socialisto rekomendis elmigradon al Usono** — propono, kiun Zamenhof mem lanĉis jam en januaro-februaro 1882. Tiu identeco de opinioj estis tre ĝojiga por la studenta gvidanto Zamenhof, sed nur provizore. (b) I. L. Levin (N. Jehalel) speciale atentigis, ke el moderna vidpunkto, en Palestino sin kaŝas granda danĝero por la starigota tie nova hebrea ŝtato, ĉar pro la sanktaj lokoj la cionistoj kaj la hebreaj klerikoj havas en siaj manoj „sanktajn“ argumentojn por mistike, obskurantisme kaj ideologie disorienti la hebrean loĝantaron kaj altrudi al la nova hebrea ŝtato en Palestino naciismon, despotismon kaj obskurantismon. Post kelkaj jardekoj tiu klarvida prognozo pri apero de monstra ŝtato realiĝis... Nun oni devas serĉi novan politikan solvon.

(Daŭrigota en n-ro 3/1989)

* **Transferi** (financa termino): sendi eksterlandan valuton aŭ oron de unu lando al alia. (latine: transferre; france: transférer; angle: transfer).

MEMORE AL TIBOR SEKELJ

La 20-an de septembro 1988, post mallonga malsano forpasis s-ano Tibor Sekelj, mondfama esplorvojaĝanto, komitatano kaj honora membro de UEA, prezidanto de la Esperantlingva Verkista Asocio, membro de la Akademio de Esperanto, preleganto, verkisto, publicisto, redaktoro.

Tibor Sekelj naskiĝis la 14-an de februaro 1912 en Szepesszombat. Dum sia tuta vivo Tibor Sekelj klopodis kaj laboris por realigi sian revon kaj planojn ekkoni forajn ekzotikajn mondpartojn, homojn kaj kulturojn. Li mem volonte nomis sin „mondvagulo“. Vera poligloto, li parolis bone naŭ lingvojn — inter ili ankaŭ Esperanton, alproprigitan dum liaj studentaj jaroj. Li konis plurajn dialektojn kaj tribajn lingvojn, komprenis ankaŭ la mesaĝojn de tamburoj. En Zagrebo li studis pentro- kaj skulptartojn, en la universitato de Buenos Aires — etnologion, antropologion kaj arkeologion. 64-jaraĝa Tibor Sekelj akiris diplomon de magistro en la Zagreba Universitato.

La mondvagulo „vagadis“ en 80 landoj. En la montgrimpado lia plej fama ekspedicio estis la atingo (du fojojn) de la 6960 metrojn alta pinto de Akonkagvo en Argentino. Tie li en 1944 lokis Esperanto-flageton. En 1962 Sekelj organizis ekspedicion nomitan „Karavano de la Amikeco“ — en Afrikon. Tiam jam 50-jaraĝa li „konkeris“ Kilimanĝaron. Vojaĝante tra kontinentoj kaj landoj li faris multnombrajn kaj grandajn servojn al Esperanto kaj ties movado. El liaj multnombraj iniciatoj kaj atingoj koncerne nian movadon elstaras lia ĉefa rolo en akceptigo de UNESKO-rezulocio pri Esperanto en 1985 en Sofio. Tiam Sekelj pli ol tridek tagojn, paŝo post paŝo, prilaboris kun granda majstreco la grundon, por ke la projekto-rezolocio estu akceptita. Li ankaŭ trovis tem-



pon prelegi en la Urba Esperanto-Domo de Kulturo en Sofio, parolis antaŭ junulara seminario en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj vojaĝis tra Bulgario. Li estis intervjuita de revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj fragmentoj de lia libro „Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo“ aperis sinsekve en kelkaj numeroj.

Kiel verkisto kaj ĵurnalisto Tibor Sekelj estis tre talenta kaj diligenta. Li redaktis „Geografia-n Revuo“-n (1956—1964), „Esperanto-Gazeto“-n, organo de la Instituto por Oficialigo de Esperanto k. a.

En la literaturo li akiris grandan popularecon dank' al siaj vojaĝpriskriboj: „Tempesto super Akonkagvo“, „Tra la Brazila Praarbaro“, „Tra la lando de indianoj“, „Nepalo malfermas la pordon“, „Mondo de travivaĵoj“, „Elpafu la sagon“. Tiuj libroj de Tibor Sekelj — kaj ankaŭ aliaj, ĉi tie ne menciitaj, atingis plurajn eldonojn. Li apartenis al la plej tradukataj verkistoj, kies libroj aperis esperante, angle, hispane, serbokroate, slovene, pole, turke, ĉine, portugale, en ses hindaj lingvoj, germane, france, hungare, japane, hebree, albane.

Tibor Sekelj estis elstara kultivanto de la homara kulturo, aktiva aganto de la paco kaj Esperanto, kiu kun arda pasio kaj ĝis la lasta spiro laboris por la noblaj celoj de la homaro.

74-a Universala Kongreso de Esperanto



— BRAJTONO (BRIGHTON), ANGLIO —
(29 JULIO — 5 AŬGUSTO 1989)

Konstanta adreso: *Nieuwe Binnenweg 176, 3015
BJ Rotterdam-Nederlando*

Adreso de LKK: *Esperanto-Asocio de Britujo, 140
Holland Park Avenue, London
W11 4UF, Britio*

Loka Kongresa Komitato: La ĉi-jara organiza komitato konsistas el dek kvar membroj, ĉefe el Londono; d-ro John C. Wells (prezidanto), s-ro Ian Jackson kaj s-ro Amador Diaz (vicprezidantoj), s-ro W. G. Atkinson (sekretario), s-ino V. B. Atkinson (protokolisto), s-ro Peter A. Danning (kasisto), s-ro Robert Alexander (loĝado), s-ino Sally Phillips kaj s-ro Edward Griffiths (ekskursoj), s-ro Don S. Lord (artaj aranĝoj), s-ro Robert Haddon (junularaj aranĝoj), s-ino Helene M. Fantom (infana kongreseto), s-ro Jonathan Cooley (informado) kaj s-ro Peter Oliver (grafikaĵoj).

Kotizoj: Ĝis la 31-a de decembro validas la plej malalta tarifo: individua membro de UEA 150 gld., nemembro 188 gld., kunulo (junulo), handikapulo-membro de UEA 75 gld., kunulo (junulo) handikapulo-membro 112 gld. La tarifo por netranspagipovaj landoj kaj por ĉiuj landoj de Afriko, Latina Ameriko kaj Azio (krom Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko) estas duona.

Glumarkoj: Jam aperis plaĉaj plurkoloraj glumarkoj kun la kongresa simbolo. Ili estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA: 1 folio de 16 markoj kostas 3,6 gld. (Por Nederlando la prezo estas 4,30 gld. Triona rabato ekde dudek folioj.)

Londona lanĉo: Ĉar la kongreso okazos ekster la ĉefurbo, oni organizas specialan antaŭkongresan aranĝon en Londono, dum kiu oni solene „lanĉos“ la kongreson kaj prezentos ĝin al la britaj eminentuloj kaj eksterlandaj diplomatoj. La lanĉo okazos en fama *Guildhall*, kie oni akceptis ankaŭ Zamenhof en 1907. Apartaj aliĝiloj por la lanĉo baldaŭ aperos. Kotizo por la lanĉo

estas 75 gld. Krom la solenan parton kun manĝeto oni antaŭvidas ekskurson tralondonan kaj vesperan programon. La organizantoj ankaŭ prizorgos loĝadon en londonaj hoteloj.

Postkongresaj aranĝoj: Oni antaŭvidas tri postkongresajn ekskursojn: 1. oficialan postkongreson en Irlando, kun flugo de flughaveno Gatwick, restado en Dublino, kaj du tuttagaj ekskursoj; 2. aŭtobusan ekskurson al Norda Kimrio, kun restado en Llandudno; kaj 3. aŭtobusan ekskurson al Skotlando, kun po, tritaga restado en Edinburgo kaj Glasgovo.

Infana kongreseto: Ĝi okazos en la privata lernejo *St. Aubyns* en Rottingdean, proksime de Brajtono. La 250-guldena kotizo, kiu inkluzivas ĉiujn manĝojn ktp, estas pagenda al la konstanta kongresa adreso. La gepatroj, kiuj volas aligi siajn infanojn, bonvolu anonci tion kiel eble plej frue al UEA-komisiito Christopher Fettes (St. Columbia College, Rathfarnham 16 Dublin, Irlando), por ke la infanoj povu ekkontaktiĝi jam antaŭ la renkontiĝo en Brajtono.

Loĝado: Estos disponeblaj pli ol 1 800 litoj, en diverskategoriaj hoteloj kaj en multtekosta amasloĝejo. En pli modestaj hoteloj kaj tranoktejoj la tagprezoj varias inter 40 kaj 80 guldenoj. Ĉiuj prezoj inkluzivas abundan anglan matenmanĝon. Tranokto kun matenmanĝo en la universitato (rande de la urbo, sed kun bonaj trafikligoj) kostos 67 guldenojn tage. Eblas mendi ankaŭ tranokton sen matenmanĝo, en studenta hejmo proksime al la universitato, por ĉ. 106 guldenoj semajne.

(El „Esperanto“, n-ro 11/1988)

La ekonomia agado ĉe BEA



La ekonomio estas fundamento de ĉiu socio. Por nia nuntempo tio gravas en plej alta grado. La ideoj donas sencon al la ekzistado de nia civilizacio, sed nur per ideoj ĝi certe ne povus ekzisti.

Mi ne intencas filozofii pri politik-ekonomiaj temoj, sed estas tute klare, ke nia movado ankaŭ bezonas rimedojn. La eksterlandaj esperantistoj ofte demandas — ĉu nia ŝtato estas tiom riĉa, ke ĝi povas apartigi rimedojn por la E-movado? Fakte, en Bulgario la esperantistoj disponas pri sia propra E-kursejo en Pisanica (kun 200 litoj) kaj nun oni konstruas kelkajn pliajn E-domojn en diversaj regionoj de la lando. La E-societoj ricevas ĉiujaran subvencion fare de CE de BEA.

Sed mi tuj klarigus, ke ĉe BEA ekzistas ekonomia agado, kaj parto de la gajno restas por la bezonoj de nia E-movado. Tiu agado komenciĝis jam en 1983, tamen kun permeso de la Ministra

Konsilantaro en 1984 ĉe CE de BEA estis fondita la Ekonomia Direkcio „Globus“, kiu unuigis la entreprenojn kaj la etproduktantojn. Tiamaniere en la lando ekfunkciis ekonomia sistemo el entreprenoj ĉe iuj el la eksaj distriktaĵoj de BEA. La entreprenoj gvidis la centra direkcion en Sofio. Eklaboris entreprenoj en Sofio, Kubrat, Târgoviște, Varna, Razgrad, Plovdiv, Ruse k. a.

La komenca agado estis direktita al kooperado kun produktistoj ekster „Globus“ kaj al produktado de etaj vivbezonaĵoj. Dum kelkaj jaroj la ekonomia agado ĉe BEA ege progresis kaj hodiaŭ la Ekonomia Unuiĝo „Globus“ inkludas 14 entreprenojn kun 2020 laboristoj. Pri iuj novaj momentoj en la agado de la unuiĝo informas ĝia ĝenerala direktoro Jordan Veselinov:


— *La bulgara merkato bone akceptas niajn produktojn. Ni strebas al rapida prilaboro de novaj vivbezonaĵoj. Depost 1987 ni membras en la plej granda unuiĝo „Industrio por la homo“, por produktado de vivbezonaĵoj: trikotaĵoj, laborvestoj kaj ŝuoj. Lastatempe estas konstatebla intereso pri vestoj ellaboritaj en niaj entreprenoj. Nun oni intertraktas pri eksporto de niaj produktoj kun firmaoj el Sovetunio, Kanado kaj Hungario. Baldaŭ ni organizos produktadon de ĝardenameblaro el ligno — varo, kiun nia merkato bezonas.*

Nun en Ekonomia Unuiĝo „Globus“ oni produktas di-

versajn serĉatajn varojn: en Plovdiv — trikotaĵojn, ŝuojn, novedzinajn robotojn, kooperan produktadon de aŭtomobilaj partoj; en Veliko Târnovo — kooperan produktadon en elektroniko; en Septemvri — fajnajn virinajn vestojn; en Ruse — virinajn bluzojn kaj parkedon; en Ĥaskovo — sportajn jakojn; en Ĉepelare — laborvestojn; en Pleven — elektroproduktaĵojn; en Gabrovo — elektroproduktaĵojn, sledojn k. a.

Multaj el la laboristoj kaj oficistoj de EU „Globus“ estas esperantistoj. Ili aktive partoprenas en la agado de siaj E-societoj, vizitas E-aranĝojn kaj kongresojn. Per sia ĉiutaga laboro ili garantias la hodiaŭan kaj morgaŭan evoluon de la E-movado en Bulgario.

Atanas ILKOV



Dekoracia muro-ornamaĵo produktita de EU „Globus“.

Foto: Kirilka Savova

„ESPERANTO MALKOVRIS AL MI NOVAN MONDON“

En la aŭtuno de 1940 en kunveno de esperantistoj en Sofio aperis nova homo. „Kiu li estas, kie lernis la lingvon?“ — oni demandis sin. Kaj iom poste oni jam instigis lin paroli en Esperanto. Li tamen klarigis, ke ĝis nun li ne havis la eblecon interparoli, li nur korespondis. Kaj ĉar iu francino — lia korespondantino, tre ŝatis anekdotojn li, laŭ sia povo, tradukis anekdotojn kaj sendis ilin al ŝi. Kaj nun antaŭ siaj novaj amikoj Todor Ŝoŝev deklamis unu el tiuj anekdotoj.

Iom post iom la Sofiaj esperantistoj al kutimiĝis renkonti en siaj kunvenoj la altan blindan junulon kaj baldaŭ post 9.IX.1944, laŭ propono de Asen Grigorov, lia unua E-instruanto, oni eĉ elektis lin en la estraro de la Sofia societo.

Se pro malriĉeco kaj malsano li ne estus deflankiĝinta de la elektita vojo, Todor Ŝoŝev verŝajne estus fariĝinta muzikisto. En la Ŝtata Instituto por Blinduloj li lernis ludi violonon ĉe Miĥail Ŝeĝerĝiev kaj pianon ĉe Petko Stajnov. Li estis tre feliĉa, kiam en 1935 li fariĝis studento en la Bulgara Ŝtata Konservatorio. Por vivteni sin li ludis en tavernoj, sed la gajnita mono ne sufiĉis eĉ por la ĉiutaga pano. Li malsaniĝis kaj revenis sian naskiĝvilaĝon Sveŝen (proksime al urbo Karlovo). Grandega estis lia elreviĝo, sed la tagoj ne pasis sencele kaj senspure. Li persiste lernis Esperanton. Kiam lia fratino havis liberan tempon, ŝi helpis lin kaj sub ŝia diktado li reskribis brajle malgrandan Esperanto-Bulgaran Vortaron, kiun li ĝis nun gardas. Ekde la jaro 1939 li ricevadis brajle „Esperanta ligilo“. Li legis 5—6-foje ĉiun artikolon, ĉar li deziris ĉion kompreni, memorfiksi pli multajn vortojn.

„Esperanto malkovris al mi novan mondon, ligis min kun homoj el diversaj landoj“ — rakontas Todor Ŝoŝev. „De nevidantoj mi eksciis interesajn novaĵojn, ĉerpis novajn ideojn pri nia agado.“

Ekde sia junaĝo Todor Ŝoŝev estas inter la plej aktivaj agantoj de la Asocio de Blinduloj en Bulgario, de la Popola Konsumkooprativo de Blinduloj kaj de legosocieto „Luis Braille“. Sciema, diligenta, discipline, persista kaj iniciatema, li akiris la konfidon de siaj kamaradoj, kaj por pluraj jaroj oni elektadis lin en diversaj estraroj. Dum certa tempo li estis prezidanto de la Asocio de la Blinduloj en Bulgario. Sed plej fruktodona estis lia agado kiel vicprezidanto kaj gvidanto de la ekonomiaj aferoj de la Asocio de la Blinduloj (1959—1975). Dum tiu periodo la jam ekzistantaj entreprenoj por blinduloj stabiligis kaj plivastigis, sed ankaŭ senĉese starigis antaŭ la asocia estraro novajn taskojn. Todor Ŝoŝev estis senlaca en organizado de novaj specoj de produktado, en konstruado de produktadaj konstruaĵoj, loĝejoj, kulturdomoj, ripozejoj ktp. Filioj de la entrepreno „Uspeĥ“ (Sukceso) aperis en diversaj partoj de la lando; oni enkondukis la produktadon de filtriloj, valizoj, elektroprovizaj instalaĵoj por aŭtomobiloj, ŝaltotabuloj, ŝnurigitaj kabloj, ĵakoj, kontaktiloj... Kreskas la amplekso de la industria produktaĵo, plimultiĝas la gajno, variigis la agado de la Asocio, pliboniĝas la vivo de la homoj sen vidka-



pablo. Laboristoj kaj oficistoj jam havas bonajn enspezojn, loĝas en oportunaj loĝejoj, legas librojn en brajlo aŭ per kasedoj, vizitas kursojn kaj studrondojn, studas en superaj lernejoj...

En 1983 Ŝoŝev pensiigis, sed li ne povas ne labori. Laŭ propono de blindaj esperantistoj al li estis komisiita la eldonado de esperantlingva revuo en brajlo, aperanta 4-foje jare. Esperanto, kiu estiĝis por li fenestro al la mondo dum lia juneco, nun donis al li novan profesion. Mankis aŭtoroj, mankis tradukistoj, sed per multe da laboro kaj persisto Todor Ŝoŝev redaktas revuon „Esperanta Fajrero“, kiu jam havas 300 eksterlandajn legantojn en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, en Norda kaj Suda Ameriko, en Japanio, Ĉinio kaj eĉ en Aŭstralio.

En 1985 la konata itala blinda esperantisto Guglielmo Vassio skribis al li: „Mi ĝojas pri via revuo. Jam per sia unua numero ĝi viciĝis inter la plej bonaj.“

Ankaŭ ni ĝojas pro la sukceso de la revuo, ĉar ĝi rakontas pri nia lando kaj pri la vivo de ĝiaj nevidantaj civitanoj. En ĝia literatura rubriko de tempo al tempo aperas versaĵoj ankaŭ de Ŝoŝev. Iujn el ili li verkis rekte en Esperanto. Jam en 1957, en Internacia Literatura Konkurso en Hispanio li gajnas la unuan premion, poste en Italio — diplomon, kaj en 1969 — duan premion en konkurso de BEA. Liaj sonetoj enestas en la antologio „Rozo kaj Glavo“. Plej ofte li verkas pri amo kaj sufero.

La 16-an de novembro 1988 Todor Ŝoŝev fariĝis 70-jara. Tio estas bona okazo gratuli lin kaj bondeziri al li plurajn jarojn da laboro kaj kiel redaktoro kaj kiel prezidanto de la Sekcio de Esperantistoj-Blinduloj ĉe BEA.

Mira POPOVA

BET en Sovetunio

Kaj denove survoje, aŭ pli ĝuste — aviadile. Ĉar nia celo estis sufiĉe malproksima — Kievo kaj Rostovo ĉe Don, laŭ invito de rostovaj esperantistoj kaj de samideano Aleksandr Melnikov persone.

De la 6-a ĝis la 8-a de novembro j. k. en Rostovo okazis la Dua Festivalo de Esperanto-Kulturo. Ĝia programo inkluzivis koncertojn de originalaj kaj tradukitaj en Esperanton kantoj; revuon de Esperanto-kasedoj kaj -diskoj; ekspozicion kontraŭ fumado, alkoĥolismo kaj narkotomanio; renkontiĝon kun Andy Künzli; kaj la lasta programero en la festivalo estis nia spektaklo „Fabelo pri kalpakoj“ de P. Panĉev.

La festivalon partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj el 20 urboj de Sovetunio. En la salono de la Kulturdomo de la Asocio de Blinduloj, kie okazis nia spektaklo, mankis plej konvenaj por teatra spektaklo kondiĉoj, sed per la helpo de la rusaj amikoj-teknikistoj, ni aranĝis sufiĉe bonan scenejon, ekfloris la ruĝa koloro de bulgaraj kovriloj, eksonis folkloro muziko kaj Luna komencis: „Estis iam bela-belega vilaĝo, bela kiel la tuta lando bulgara...“

Tre varme estis akceptita ĉiu sceno, ni sentis la ĝustan reagon al humuraj replikoj

kaj ĉe la fino — longdaŭraj aplaŭdoj kaj belaj floroj por ni ĉiuj!

La rostovaj esperantistoj ricevis niaflanke librojn, diskojn kaj nian sinceran dankon!

Jurnalisto el loka gazeto intervjuis nin. Li interesiĝis pri biografio kaj agado de Bulgara Esperanto-Teatro. Sekvis invito por ni ĉiuj far la teknikistoj je taso da rusa teo; invito prezenti venontjare nian spektaklon en Minsk; kaj amika tagmanĝo, dum kiu ni daŭrigis la interparolojn, pri ilia kaj nia Esperanto-agado. Vere bonaj esperantistoj, entuziasmaj, kun ambicio pri ankoraŭ pli aktiva organiza vivo, pri fondiĝo de sekcio de MEM, kun deziro viziti Bulgarijon, partopreni kursojn en Pisanica.

„Ĝis revido!“ estis niaj adiaŭaj vortoj, ĉar vere dezirata estas „la revido“!

Niaj unuaj tagoj en Sovetunio pasis fakte en Kievo — la bela, impona, heroo ĉefurbo de Ukrainio. Dank' al la afableco de Svetlana, de Saŝa, de Griŝa, de Miŝa, multon el la urbo ni vidis, multajn belajn ni admiris,

antaŭ multaj monumentoj ni kliniĝis. Kaj denove ni estis mirigitaj, kiel bone tiuj homoj konas la historiaĵojn, kiel forte ili amas sian urbon!


Ni ĝuis du renkontiĝojn en lernejo, kie samideano Miĥail Lineckij instruas Esperanton. Antaŭ lernantoj el sesa klaso ni rakontis pri la krea agado de BET, respondis al iliaj interesaj demandoj pri Esperanto en Bulgario, pri lerneja laboro de bulgaraj samklasanoj... kaj gustumis regalon. Per la donacitaj de ni gramofondiskoj, ili aŭdis la kantojn de la „Ruĝaj Kravatoj“.

Sekvis renkontiĝo kun okaklasanoj kaj plenaĝaj esperantistoj el ilia klubo. La programo estis preskaŭ la sama, sed ni aŭdis ilian E-programeton, ili aŭdis la nian; kompreneble interparoloj, ŝanĝo de adresoj... do, kutima varma esperantista etoso.

Vespere la bela urbo brilis per lumaj girlandoj sur preĝejoj kaj konstruaĵoj, ĉar la sovetaj homoj festis sian revolucionan tagon, ruĝis sloganoj en rusa kaj ukraina lingvoj, glorigantaj la datrevenon de la Oktobra Revolucio. Ĉar ni gastis ĉe niaj sovetiaj amikoj-esperantistoj ĝuste dum la tagoj de ilia granda festo — festo ankaŭ por ni, la aktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro — G. Lukanova, L. Davidova, B. Beleva, V. Zjumbjuleva, M. Uzunova, T. Jurukov, N. Uzunov, N. Makaveev.

Belka BELEVA

LA MAJSTRO



Mempotreto

Vladimir Dimitrov — la Majstro (1882—1960), estas brila artisto, unu el la plej originalaj bulgaraj pentristoj kun monda famo. Jam en siaj studentaj jaroj li kreas valorajn belartajn verkojn, gajnas multajn konkursojn kaj ricevas la alnomon „La Majstro“.

Kiel militpentristo dum la Balkana Milito (1912—1913) kaj dum la Unua Mondmilito (1914—1918) en multaj pentra-

joj li kun amo prezentas la malfacilan soldatan vivon kaj la teruraĵojn de la milito. Lian proteston kontraŭ la milito plej forte esprimas la bildoj „Invalidoj“, „Mortigita bulgara soldato“, „Ripozo“, „Patrolanda kanto“ ka.

Sian kreaan maturecon la Majstro atingas post 1920, kiam formiĝas lia originala stilo, kiu prezentas grandan kontribuon al la evoluo de la bulgara pentroarto. Ĉirkaŭ 27 jarojn li laboras en sia naskiĝloko — vilaĝo Ŝiŝkovci, apud Kjustendil. Kun granda amo li respegulas la vilaĝanan vivmanieron, la ĝojon pro la laboro, la popolajn kutimojn kaj festojn, serĉante la karakterajn trajtojn de la bulgara nacia tipo. Sur la fono de orkolora greno kaj fruktarboj kovritaj de maturaj fruktoj li pentras portretojn de kamparanoj kaj kamparaninoj kiel simbolon de vivĝojo, de morala kaj fizika beleco.

Serĉante novajn formojn por rekrei la realaĵon, la Majstro pentras per plataj kolormakuloj

el brilaj, preskaŭ puraj spektraj farboj, kuraĝe harmoniigitaj, aplikas la stiligitan dekoracian formon. Liaj bildoj estas kolorriĉaj, harmoniantaj kun la majesteco de la naturo, kiu estas ĉiama fono kaj grava elemento en lia belarta mondo.

La multnombraj verkoj de la Majstro estas posedaĵo de ŝtataj kaj privataj kolektoj ne nur en Bulgario, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj. La plej granda parto de ili tamen troviĝas en la Pentraĵgalerio en Kjustendil kaj en la Nacia Pentraĵgalerio en Sofio.

Pro lia granda kontribuo al la bulgara pentroarto, la Majstro estas honorita per altaj ŝtataj distingoj: Dimitrov-premio (1950), popola pentristo (1952), ordeno „PR Bulgario“ — I grado (1957), ordeno „Georgi Dimitrov“ (1959).

Vera humanisto, kiel membro de la Monda Packonsilio, per sia verkaro la Majstro batalis kontraŭ la milito kaj la perforto, por paco kaj interkompreniĝo de la popoloj.

Lidia RAEVA



Tri junulinoj

Diptiko pri la Majstro

I. La homo kun amplena koro

Pentristo paŝas en la kampo
sub la varmega sun',
li haltas tie, en la rando,
kie virin' atendas nun.
Ne, ŝi ne venis por pozado —
ĉu povus fari tion ĉi,
se hejme mortas la infano?
Ŝi flustras ion sen konsci', —
Kaj li manpare al ŝi donas
monatsalajron sian tuj.
Ĉu vere ĝin li ne bezonas?
Denove solas... Restas nur
li en ĉemizo kaj kostumo
delonge eluzita jam.
Kaj tiel preĝas li,
Peniko en alia man'...
Kaj por forpeli la doloron
de la virino, kun inspir'
desegnas li branĉetojn, florojn,
en kiuj dancas suna bril'.
Desegnas fruktojn orsimilajn —
ho, ne, ne mortos la infan!
Desegnas okuletojn brilajn'.
Ne haltos baldaŭ lia man'.
Necesas do, ankoraŭ kaj ankoraŭ —
ĉielo kaj kamparo, tuta mond'.
Kaj noktoj kun siringodoro.
Rideto sur la horizont'.
Kaj fine laca li sidiĝas
sur la vesperkrepuska herb'.
Apenaŭ nun, apenaŭ nun naskiĝas
la juna, admirinda ter'!

Ho, kian senŝarĝecon sentas
vi post ĉagrenoj, depresi'.
se scias vi, ke la riĉeconde l'mateno
per via malriĉeco pagis vi!

II. Li iam pentris ŝin inspire

Mi serĉas la iaman belon
de la virino, kiun li,
la Majstro, kvazaŭ en fabelo
ekvidis ĉe l'kampara stri'.
Jen la okuloj kaj la manoj.
Ho, dio, sama — la rigard'!
La sun' ne brilas, sed ĉu gravas?
Ĝi videbliĝas en la ĉarm',
en la blankeco de l' hararo,
en tiuj sulkoj, en la tembr'.
Kaj mi al mi prezentas klare
la junvirinon en maten':
alpaŝas ŝi la freŝan roson
pomuja branĉ' malantaŭ ŝi,
la belaj brovoj ektemetas
pro ekludinta sunradi'.
Kaj jen la Majstro enreviĝas
pri la beleco de la mond'.
Kaj sur la tolo disverŝiĝas
jam multkolora, kanta ond'.
La mano tie kuŝas bele
kaj bele pezas la branĉar'.
Ŝi banas sin en sun' fabela.
La sun' rebrilas en la val',
en ŝiaj ringo, koliero,
en la fidelo de la am'.
... La farbo gutas sur la teron
samkiel ŝvito en grenkamp'.

Tradukis:
Venelin MITEV.



Dragomir Šopov naskiĝis la 13-an de aŭgusto 1938 en Sofio. Li finis bulgaran filologion en la Ŝtata Universitato „Kliment Ohridski“. Nun li laboras kiel vicĉefredaktoro de tag-jurnalo „Zemedelsko Zname“.

Liaj versaĵoj etas tradukitaj en rusan, polan, rumanan kaj aliajn lingvojn. Ĝis nun aperis dek liaj libroj, inter kiuj „En unu pluvguto“, „Herbo kaj neĝo“, „Memoro pri la tago“, „Aero por kanto“, „Por longe tie ĉi“ k. a. Li estas aŭtoro de la publicista libro „Ni ne mensogu la vivon“. Aperis ankaŭ lia porinfana poemkolekto „Malobeema vagonaro“.

La poezio de Dragomir Šopov estas sincera; tio estas malkaŝa konfeso de la aŭtoro pri problemoj, kiuj okupas kaj emocias nian nuntempulon — la paco, la naturo, rilatoj inter la homoj. La aŭtoro sin apogas sur la realismajn tradiciojn de la bulgara literaturo kaj penas trovi sian lokon inter la riĉa varieco de la nuntempa liriko.



Rada DOBRIANOVA

PANTA REY

Sidiĝu ĉe la tablo de rememoroj kaj forgesu la triston, kiu tondras en la vejnoj, stringu la ventron por ne fali pro rido kaj ekstaru firme sur la teron kiel sur solidan fundamenton, kian jam delonge lernis serĉi la homo ĉe ĉiu sia iniciato kaj por ĉiu krea-ta de li objekto; nur ne duonfermu la okulojn, ĉar la mondo malsupra estas nubo ŝanĝema — nun ĝi estas kerubo, post momento — terura dinosaŭro kun faŭkanta buŝego, poste — arĝenta mortotuko, senfina en la daŭro de la tagoj; haltu ĝis tie he, homo: la metamorfozoj senlace sin intersekvas, ĝustaj kaj malĝustaj, plenigas vian avidan rigardon kaj kondukas vian vivovojon al la maljuneco, se vi havis la ŝancon naskiĝi sub la signo de la Amforo, kiom oni povas fidi la zodiakan kalendaron, kaj kiom la racio estas alta lumo, se estas forto — la forto kaj la eltenemo de la tera leĝo, ĉar alie... Brilu per mildaj koloroj, konsilis iu, per la mildaj koloroj de la papiliflugiloj... Nun, kiam tintas ŝia dolĉa voĉeto, mi ne povas paciĝi kun tiuj pseŭdokristanaj vortoj, doktoro, mi ne povas ne diri rekte: Desi estis vera delikate brila papilio, kiu sukcesis nek demeti degenerintan feton,

Panta rey — Ĉio fluas (helena proverb)

Rada Dobrianova estas unu el la junaj bulgaraj prozverkistinoj. Ŝi finis bulgaran filologion en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“, kaj nun ŝi estas redaktorino en la literatura revuo „Sâvremennik“ (Nuntempulo).

Ŝiaj noveloj aperis en multaj bulgaraj literaturaj revuoj kaj ĵurnaloj. En 1985 aperis ŝia unua novelaro „Domo por vendado“ kaj en 1988 — la romano

„La erigema deklivo“. Antaŭstaras ĉi-jare la apero de ŝia libro „Kortkvadrato“. En la centro de sia atento R. Dobrianova starigas problemojn el la nuntempa vivo.

La rakonto „Panta rey“, kiun ni proponas al la legantoj de „Bulgara Esperantisto“, estas el la libro „Domo por vendado“.

„BE“

kaŝitan en la kokono de la ĝenerale akceptitaj kutimoj, nek forbruli en la varmego de longa sunradio. Verŝajne ĉar ŝi estis ankoraŭ infano kaj ju pli ŝi malgrandiĝis, des pli kreskis mia doloro — tiu patrina kulpo senpuna...

Kiu plantis furiozecon en la homon, ne grave ĉu ĝi estas pro amo aŭ tiu natura ruzo direktita al memkonservo de la individuo kaj destinis Homon Sapiens aŭ Homon Burokratis al tiu pereiga direkto, kie la fingroj dancas sur la ĉanellasilo de la eterneco, de kiu ni venas kaj kien ni revenas per mallongaj paŝoj, ne finirintaj kaj ŝvebantaj en sia duondia senmorteco, sed fakte plenaj de teruro antaŭ la Ekstremo, kaj kiom malproksime ĝi estas, doktoro, se ĝi tamen ekzistas?

Mi parkere memoras la ŝtelviditan trans via ŝultro timigan tekston, kiun vi neniam bonvolis agnoski, ĉar ĝi estis prijuĝo, kiun vi neniam tutanime akceptis. Tie estis skribite: „En la maldekstra fundamento parakardie videblas densa desegnaĵo granda kiel monero de kvin stotinkoj*, neklare

* stotinko — unu 100-ono de bulgara mono (levo)

konturita kaj ligita kun la disbranĉigoj de la malsupra parto de la maldekstra hilo. Pro ioma turniĝo de la infano dum la ekspono la dekstra hila ombro estas bone videbla..." Estis ankoraŭ, sed tio ne gravas. „Tedas al mi la frenezaj gepatroj, diris vi, la infano bezonas specialajn zorgojn". „Pantofloj, dentobroso, bantuko, libro kaj kelkaj etaj ludiloj...", elnombris deĵorvoĉe la deĵoranta flegistino, rigardante mian vakskoloran vizaĝon kun malaprobo kaj verŝajne kun enua pacienco pro la ripetiĝanta ago. Poste mi sentis la malakran frapon en la kokso kaj pikon maldekstre. Ruĝaj guteroj de ruĝa pluvego per giganta bruego surŝutis min de ĉiuj flankoj, la punca ĉevalo ekŝenis, malseka kaj freneze timigita, impete sin ĵetis sur min, miaj kruroj fleksiĝis, mi falis. Ĉu mi deliris ununuran momenton aŭ horojn, mi ne memoras. Kiam mi malfermis okulojn — sur la malvarmeta kuseno via malfermita vasta manplato kuŝis sub mia kapo kaj subtenis ĝin kvazaŭ rompiĝeman flortigeton. Dum vi eltiris la manon por denove mezuri la pulson, mi eksentis delikatan aromon de tualeta sapo. Sava bonodoro! Tiel bonodoris la kamparaj florientaj trifolioj, kiam ni kun Desi kuris tra la kampo al la abelujoj. Ili estis multkoloraj amasetoj meze de la verda altaĵo, kaj de malproksime similis homajn loĝejojn. La abeloj babileme zumis ĉirkaŭe. Desi ne timis ilin — mirinde, ĉar ĉiu vivanta estaĵo timigis ŝin (escepte nur de hirundoj). Mia bopatro ege ĝojis pro nia alveno (tiam ni ankoraŭ vivis kun Ljubo). La manoj de Ljubo hirtis blankaj, kvazaŭ de ĉina porcelana pupo kaj la longaj fingroj estus malbele longaj por lia malgranda staturo, se li ne ludis tiom lerte gitaron, elektropianon, pianon, tamburojn, povas esti eĉ ankoraŭ ion, sed mi jam forgesis. Mi memoras nur la „Fendron", per kiu li ludis ne pro io alia, sed ĉar li rompis per ĝi mian nazon. Fluegis sango, li paliĝis, iris kun mi en la poliklinikon, tie oni min kudris. Tiam Desi multe ploris, poste komencis hakparoli. Mi daŭre vivis kun Ljubo pro ŝi. Li ofte eksplodis, ĉar estis malforta, sed deziris ĉion. Fojfoje li prenis mian manon, tordis ĝin ĝis bluiĝo, aŭ frapis per mia kapo la klavaron de la piano, aĉetita brokante de lia onklo. Ljubo koleregis pro mia eltenemo — neniam mi kriis, nek petis pri helpo, tial liaj frapoj venis



Grafikaĵo: Penka Petkova

sur lin, aŭ kiel vi konjektas, doktoro, pleje sur Desi.

Post multaj jaroj Ljubo venis denove. Ĉu vi malsatas? — kaj mi puŝis al li la teleron kun ankoraŭ varmaj terpomaj flanoj. Mi havis iom da vino el Miĥajlovgrad, pamidbera. Li ne trinkis. Silentis malserene kaj foliumis iun kajeron de Desi, restintan sur la kuireja tablo. Desi, se ŝi estas trankvila, skribas diligente, sed pli ofte ŝi surstrekas kaj faras grandajn inkomakulojn per la skribilo. Neniam mi faris rimarkigojn al ŝi. „Ne murdu la spiriton de la infano", mi aŭdas la vortojn de mia avino. Kiam ŝin trafis la infarkto, ŝi nur elkriis: „Ivaĉjo!". Avo hakpecigis brullignaĵon sub la juglandarbo kaj ne aŭdis ŝin. Tiam mi elkuris kaj diris: „Avino vokas vin, tenas sian koron, por ke ĝi ne doloru...". Kiam ni ambaŭ enkuris en la somerdoman ĉambron, ŝi kuŝis etendita sur la lito, mirrigardis la blankan stukaĵon de la plafono, la mano daŭre kuŝis sur la brusto, sed ŝi nek ĝemis, nek moviĝis. Furiozaj sonoj en la gorĝo de avo klarigis al mi, ke ŝi ekdormis por eterne. Ŝi ripozas en tiu eterna ekstazo, kvieta kaj trankviliĝinta, ĝis kiam la memoro pri ŝi tute paliĝos, poste ankaŭ la nomo, mia nomo-Kamela, ĉar ĉio estas forgesenda...

Ĉio estas forgesenda, ripetis mi, senutile estás paroli. Ljubo foriris malbonhumora, malica. Dank'al dio, proksimiĝis noktomezo kaj Desi dormis. Longe mi alpremís ŝian malfortikan korpeton al mia brusto, miaj larmoj lavis ŝian blankan, kvazaŭ de ĉina porcelana pupo, vizaĝeton; la palpebroj sur la senkulpaj infanaj okuloj de tempo al tempo apenaŭ rimarkeble tremis en sonĝo.

Finfine, doktoro, vi komprenis: ŝi estas iom stranga infano — ne ŝatas la ŝnurludon, nek lá damludon, kaj la lulilojn simple malamas. Ŝi timas ilin. Nur mi kapablas trankviligi ŝin, se tio entute eblas, tial mi petis resti ĉe ŝi. La malsano de Desi estis nevidebla, tial ŝi estis facile vundebla kompare kun la sanaj kaj vivkapablaj. Estis ia neklarigebla tabuo ĉirkaŭ ŝi, kiun nesciate kial la homoj evitis malkaŝi, kvazaŭ ĝi portus ian nekuraceblan infekton. Ian dormantan eksplodon kaŝis la ŝelo ĉirkaŭ ŝi, ŝelo, kiu aŭ rompiĝis kun neatendita furiozo sekвата de ĉeno da strangaj reagoj, aŭ tute perdiĝis, kvazaŭ Desi estus iu tute ordinara knabineto — milda kiel ĉiuj aliaj. Kiel mi povus inspiri al ŝi amon, doktoro?

Tra la fenestro, hirtantaj super la malaltaj antaŭurbaj domoj, videblas akraj turoj de la ĵus restaŭritaj fortikaĵmuroj kaj malproksime trans ili — peco da monto. Ĝuste malantaŭ tiu kruta linio de la alta montokresto, kvazaŭ naĝante, sin kaŝis la sunorango, kiam vi eniris. Mi ekkonis vin, antaŭ ol ekrigardi — min surblovis saporomo, via vizaĝo solene kaj rigore silentis. „Mi enkon-

dukis krom medikamentaj, ankaŭ kelkajn aldonajn fizikajn kuracilojn — elektroakupunktur, fizioterapion k. a. Tie ĉi, en la malsanulejo, la infanoj vivas kvazaŭ en socio, ĉar ili komuniĝas kiel sanaj, kaj Desi bezonas ĝuste tion“. Vi parolis zorgeme, mi ne kuraĝas diri — kun patra sincereco. De kie mi trovis fortojn ekrideti? Mirinda estas la homa rideto — kiel la tagoj: hastaj aŭ pigraj, sed ĉiam reviviĝantaj denove kaj denove post ĉiu nokta koŝmaro aŭ dolĉa espero...

Provu ne fiksrigardi la triston — ĝi mem postkuras vin, ne turnu rigardon malantaŭen, kie vi ĉiam ĉeestas, kaj kie vi estas la ĉefrolanto, ĉar ankaŭ morgaŭ estas tago, kiu kondukas post si la sekvan. Post la preparo de la vespermanĝo prenu la trikaĵon kaj preparu la maniktruon. Vi devas kalkuli: kvar maŝoj, duobla maŝo, kuntriko, denove maŝo... Ne kliniĝu malalte, por ne sufoki la vivantan karnon sub via koro; ĝi frapetas per nekomprenebla por vi alfabeto, kiun vi ĝis la fino ne komprenos, ĉar la homo mem estas nekomprenebla kaj vi estas nur vitra kovrilo, por laŭ la homa leĝo gardi lin kaj inspiri al li elteneblecon.

La terpomaj flanoj eligas varman vaporon, doktoro, via deĵoro baldaŭ finiĝos kaj iun tagon vi nepre revenos — mi estas proksime — kobutapogiĝinta ĉe la pilorio, etendinta manojn ĝis la ĉielo — mi gardas la necesan prapekon de la patrinoj, kiu por bono aŭ malbono, ĉiam puŝis antaŭen la vivon.

La temo „Esperanto“ en filatelo

Esperanto eniris la filatelon jam en 1911, kiam en Bavario aperis poŝtmarko kun Esperanta teksto. Sovet-Unio en 1925 unua emisiis poŝtmarkojn pri Esperantaj temoj. Ekzistas multaj filatelaj kaj poŝtaj materialoj el Aŭstrio, Brazilo, Bulgario, Pollando, USSR, Hungario, Jugoslavio kaj aliaj landoj, kiuj povas servi kiel filatela kolekto „Esperanto“. Temas pri poŝtmarkoj, bildkartoj, kovertoj, specialaj sigeliloj ktp, emisiitaj okaze de Esperantaj eventoj kaj datrevenoj.


La unua bulgara poŝtmarko pri Esperanta temo aperis en 1947, kaj la lasta — en 1987. Ĝis nun en nia lando estas emisiitaj 7 similaj poŝtmarkoj. Jen la kronologio: en 1947 — okaze de la 40-jara datreveno de BEA, 60-jariĝo de Esperanto kaj 30-jariĝo de la morto de Zamenhof; 1957 — 70-jaroj de Esperanto kaj 50-jaroj de BEA; 1959 — 100-jaroj de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof; 1962 — 35-a Nacia E-Kongreso en Burgas; 1963 — 48-a Universala Kongreso de Espe-

ranto en Sofio; 1978 — 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varna; 1987 — 100-jaroj de Esperanto.

Estas filatelistoj-esperantistoj, kiuj per sia korespondado kreas filatelajn E-kolektojn. Sistemigitaj laŭ kronologio kaj objektoj, la poŝtmarkoj respegulas la historion de la E-movado, montras la kontribuon de la esperantistoj al la pacbatalo kaj homa progreso.

Gjorgo KIROV

Salám alléjkuum



En daŭro de jarmiloj la diversaj gentoj kaj popoloj kreis siajn morojn kaj kutimojn. Parto de ili estas la multnombraj salutoj, per kiuj la homoj esprimas sian estimon unu al la alia. La ordinaraj, sed esprime-naj salutoj: „bonan matenon“, „bonan tagon“, „bonan vesperon“ kaj „saluton“ ekzistas en ĉiuj lingvoj. Krom tiuj esprimoj en Arabio kaj en iuj aliaj landoj de la Oriento la popoloj, kvankam parolantaj en diversaj lingvoj, uzas la saman imitindan esprimon, nome: Salám alléjkuum*. Tiun esprimon oni uzas en ĉiuj horoj de la tagnokto por elmontri estimon al siaj najbaroj, al siaj proksimuloj, al nekonataj homoj. Tiun esprimon uzas infanoj kaj plenaĝuloj, virinoj kaj viroj, tial ĝi ofte anstataŭas la ceterajn salutesprimojn.

* Pacon al vi!

Estante longan tempon en Irako, mi al kutimiĝis uzi tiun esprimon. Foje mi renkontis maljunulon. Li estis alta, malgrasa kaj aspektis kaduka ĉu pro la jaroj, kiuj certe jam pezis al li, ĉu pro la zorgoj atakantaj lin eĉ dum lia maljuneco.

— Salám alléjkuum! — salutis mi.

— Sa-alá-am! — respondis la maljunulo, eldirante la koncizan formon de la konata saluto.

En lia tono mi kaptis tedon kaj malŝaton. Tio pensigis min. Mi turnis min al la preterpasantaj viroj. Post interŝanĝo de la kutimaj salutoj mi demandis:

— Kial li estas malbonhumora? Ĉu multe li suferis dum sia vivo aŭ li jam sentas la finon?

— Ne ofendiĝu! — respondis la araboj. Li ĵus eksciis, ke mortis lia filo. Du liaj filoj pereis en la milito kaj nun ankaŭ pri la tria alvenis sciigo. Kion fari? Alaho tiel aranĝis lian vivon.


Kaj ni disiĝis. Nesciante kion fari kaj kiel esprimi miajn kondolencojn al la maljunulo, mi rigardis post li ĝis lia figuro malaperis de mia vidkampo.

La milito inter Irako kaj Irano daŭris ok jarojn. Iuj nomas ĝin militkonflikto. Militkonflikto aŭ milito? Ja la diferenco estas nur en la vortoj. Dum tiuj ok jaroj pereis miloj da senkulpaj homoj.

Nun en Ĝenevo la ministroj de la eksteraj aferoj de Irako kaj Irano pridiskutas la pakkondiĉojn. Ni bondeziru al la popoloj de Irako kaj Irano pacon kaj prosperon! Pacon kaj prosperon al la du najbaraj landoj — luliloj de antikva kulturo, heredantoj de multjarcentaj moroj kaj kutimoj!

En oktobro 1988

Georgi MIĤAJLOV





Juna Esperantisto

En 1987 al bulgaraj esperantistoj gastis japana grupo el 9 gelernantoj kaj 4 plenaĝuloj.

Pri ilia vizito „BE“ jam rakontis en sia n-ro 11/1987. Nun ni ricevis la impresojn pri tiu veturado de la 14-jara japana lernantino Sachiko Murajama (Saĉiko Murajama), publikigitajn en japana E-revuo.

INTER BULGARAJ JUNPIONIROJ

En la halo de la flughaveno kun rideto akceptis nin bulgaroj, kiuj de nun zorgos pri ni. Mi vidis s-inon Ganka Boĉukova svinganta la manon kun floroj, ankaŭ Maja Gorova kaj Bogomil Jivkov, ĉe kiuj ni restados. Ĉiuj elkore bonvenigas nin. Aliaj personoj, kiuj troviĝis en la halo, ankaŭ ridetis al ni. Mia unua impresio estis, kiel bonega ĉi tiu lando estas! Mi vere estis ege kortuŝita.

Alja, en nacia kostumo, kun pano kaj salo, alpaŝis nin. Ŝi estis tre ĉarma. Bulgara sinjoro nomata Nako, kiu posedas japanan lingvon, klarigis ke tia estas la bulgara maniero por bonvenigo, kaj invitis nin preni pecon de la pano kaj manĝi ĝin kun salo.

Ni direktiĝis al la parkejo kaj eniris la aŭton de Maja Gorova, kiu atendis nin. La aŭtoj ekveturis. La ŝoseo estas vasta, abundis verdaĵo. En Japanio la ŝoseoj estas malvastaj kaj maldikaj arboj estas plantitaj kvazaŭ devige. Sed ĉi tie la arboj estas naturaj kaj inter ili la aŭto kuras. Kiel bela loko!

En la ĉambro de s-ino Ganka ŝi invitis nin sidiĝi sur la sofo. La tablo estis kovrita per blanka tuko, brodita per floroj. Sur la ruĝa tapiŝo estis broditaj diversaj ornamaĵoj. Ŝi malfermis la grandan fenestron, tiam refreŝiga vento envenis, kaj bela pejzaĝo frapis miajn okulojn. La pejzaĝo ravis min. S-ro Nanba prezentis nin ĉiujn. Ni transdonis niajn donacojn. S-ro Nako klarigis la planon. Ampleksa plano, kiu ĝojigis nin, sed samtempe ankaŭ maltrankvilon ĝi donis al ni.

Ni vizitis la parkon kun multaj sonoriloj. Mi provis sonorigi ilin unu post alia. Tiu loko estis tre bela kaj pura.

Post la tagmanĝo s-ro Nako proponis, ke ni vizitu la monton Vitoŝa. Mi iris ĝis la telfero kune kun Nako, Iveta, Alja kaj Junjo. Mi estis tre ĝoja, ke mi fairĝis amikino de Iveta kaj Alja.

Ĉe la telferhaltejo s-ro Bogomil disdonis al ni biletojn. Du viroj, kiuj laboras tie, firme tenis la telferon, por ke ni sidiĝu. La deklivo de la monto estis timige impona. Sub niaj piedoj estis profunda maro el arboj.

Blankaj nuboj en la lazuro rigardis al ni. La vento estis refreŝiga. Ju pli ni iris supren, des pli mi sentis malvarmon. Post 20 minutoj ni atingis al la meza stacio, de kie ni ankoraŭ prenis telferon kaj post 20 minutoj ni atingis al la pinto, pli ol 2 mil metrojn super la marnivelo.

Reveninte en la urbon, ni vizitis katedralon, kies oraj kupoloj brilis en la sunradioj. Tie ni vidis multajn ikonojn, kiuj estas nacia trezoro.

Ni promenis tra la urbo. Ni vizitis ankaŭ la universitaton, kie studis Maja kaj Bogomil. Ni vizitis ekspozicion de bildoj pri milito, desegnitaj de pluraj pentristoj. Mi pensis, ke estus bone, se ankaŭ en Japanio oni okazigu tian ekspozicion kontraŭ milito, por ke ĝi neniam ripetiĝu.

La sekvantan matenon ni ekveturis tra vastaj kampoj al la junpionira tendaro en Sliŝovci. Tia pejzaĝo enpensis min, ke mi sentas min tre malgranda en la grandioza mondo.

Antaŭ la pordo de la tendaro multaj infanoj kun bukedoj varme bonvenigis nin. Mi estis tre ĝoja, vere ĝoja. Sed mi sentis min malbone kaj oni invitis min kuŝiĝi en la lito. La gvidantoj de la tendaro estis vere komplezemaj kaj alportis medikamentojn kaj manĝaĵon por mi. Por montri mian dankemon, mi malfermis konversacian broŝuron de japana, Esperanta kaj bulgara lingvoj kaj diris al ili bulgare „Blagodarja“ (dankon). La afablaj dommastroj komprenis min kaj respondis al mi per rideto. Kuŝante sur la lito mi ĵetis rigardon tra la fenestro. Tie estis blua lazuro kaj blankaj nuboj, kiajn mi ne vidis en Japanio. La penso, ke mi povas resti en ĉi tiu bela loko pli longe, invitis min al endormiĝo.


Vekiĝinte, mi sentis min pli bone. Iveta kaj Alja eniris la ĉambron kaj zorgis pri mi. Ni ne povis kompreni nin per vortoj, tamen mi konjektis kion ili diras. Kun reakirita bonfarto mi malsupreniris al la halo, kie ĉiuj gaje dancis. Mi ne havis ĝis tiam tiel gajan horon. Ĉe nia disiĝo junpioniroj salutis nin per kantoj, kiuj ankoraŭ restas en mia koro kiel forta impresio.

La aŭtoj haltis sur la placo, kie ni estis matene. Mi estis mirigita, ke ni revenis al la sama loko. Mi paŝis kun la grupo kaj trovis knabinojn en naciaj kostumoj, direktigantaj al ni. Ili prenis niajn manojn kaj invitis en la Junpioniran Doman.

La direktorino gvidis nin tra la Domo. Tie ni vidis bildojn kaj pupojn ellaboritajn de la geknaboj mem. Ĉiuj estis tre lerte plenumitaj. Sur la scenejo 40 geknaboj montris nacian dancon speciale por ni. Poste la direktorino donacis al ni diskojn, insignojn kaj diversajn librojn.

La aŭtoj haltis sur la placo, kie ni estis matene. Mi kaj ni alvenis la junpioniran tendaron en Kovaĉevci. Multaj geknaboj el Bulgario kaj Pollando akceptis nin. Bulgaraj knabinoj en naciaj kostumoj bonvenigis nin per pano kaj salo. En la destinita por ni vasta ĉambro la mebloj estis faritaj el ligno kaj belaj. Starante sur la balkono, ni vidis etendiĝantan antaŭ ni verdan mondon.

La programo komenciĝis post la vespermanĝo. Unue dancis bulgaraj knabinoj en naciaj kostumoj. Ankaŭ polaj geknaboj montris al ni kantojn kaj dancojn. La halo estis plena de ĝojaj vizaĝoj. Ni japanoj kantis antaŭ ili „La sunon al via manplato“ kaj „Flugu



Japanaj infanoj gaste al junpioniroj en Pernik

kolomboj". Ni kantis kun nia tuta kapablo. Polaj knaboj instigis nin per krioj. Mi ne komprenis la vortojn, sed mi sentis, ke ili ĝojas pro ni. Ankaŭ mi estis tre ĝoja.

Poste venis tempo por dancado. La geknaboj el aliaj landoj scipovis diversajn dancojn ne kiel ni japanoj. Ĉiuj faris rondon. Ĉe mia flanko staris bulgara knabo, kiu estis tre gaja. Ĉiuj kantis kun plena voĉo. Ili aspektis ĝojaj el fundo de la koro. Mi estis plene emociita pro tiu atmosfero. Se eblus, mi volus danci kun ili pli longe. En la lasta programero oni ludis diskomuzikon. Ĉiuj dancis sub la muziko. Ĉiuj havis bonan senton

de ritmo. Sed baldaŭ la gaja tempo finiĝis. Ĉiuj revenis al siaj ĉambroj.

Venis la tempo de disiĝo. La kvin tagnoktoj pasis kvazaŭ sonĝo. En la stacio ni kolektiĝis kun aliaj japanoj. Mi estis tiel malĝoja, ke mi apenaŭ retenis min ne plori. La trajno ekmoviĝis. Larmoj ŝprucis el miaj okuloj. Ĉies vizaĝojn mi vidis malfacile pro larmoj. Mi ne povis elteni la senton, ke mi devas disiĝi de Bulgario. Malaperis la lumoj de la stacidomo, kaj la trajno ekkuris tra la mallumo. Dum la tuta vivo mi tenos en mia koro la memoron pri Bulgario.

Sachiko MURAJAMA

El la japana tradukis: Nanba SYOZI

„MI ESTIS EN BELA LANDO“

Antaŭ pli ol unu monato mi ricevis leteron de mia hispana korespondanto Adonis Gonzalez Meana el urbo Ĥiĥon (Gijon), en la regiono Asturia en Norda Hispanio. En la koverto estis ankaŭ artikolo eltranĉita el la gazeto „La voĉo de Asturias“, en kiu la knabo Pablo Sekades rakontas pri siaj impresoj kaj travivaĵoj dum lia restado en Sofio kiel reprezentanto de la regiono Asturia dum la tagoj de la 4-a Internacia Asembleo „Standardo de la Paco“.

Al la atento de la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ mi proponas fragmentojn el tiu artikolo:

LA STANDARDO DE LA ASTURIA PACO REVENAS EL SOFIO

(Pablo Sekades alportas en Asturias siajn travivaĵojn en Bulgario)

Pablo Sekades Vaskes (Vasques), la infano elektita esti reprezentanto de la paco en Bulgario, revenis en la Patrolandon, alportante kun si multajn belajn travivaĵojn de sia restado en la bulgara ĉefurbo Sofio.

Pablo ekkonis tiun ĉi orientan landon, akompanate de aliaj 10 hispanaj infanoj, kiuj partoprenis la 4-an Internacian Asembleon „Standardo de la Paco“, kiu kunvenigis en Sofion, de la 8-a ĝis la 26-a de julio, ĉirkaŭ mil infanojn el la tuta mondo.

La celo de la vojaĝo estis disvastigo de la paco pere de arto aŭ sporto, sed por Pablo tiu vojaĝo signifis ion pli ol tio ĉi. Li konatiĝis kun lando diferenca de la lia, en kiu li vidis aliajn kutimojn kaj morojn. „Tio ĉi, kio grave altiris mian atenton — notas li — estis la zorgoj, per kiuj ni ĉiam estis ĉirkaŭitaj.“ Alia afero, kiu altiris la atenton de Pablo estis „la pureco de la stratoj, sur kiuj oni povas vidi nek cigaredstumpojn, nek rompitajn pipojn, nek kiajn ajn malpuraĵojn.“

Streĉita programo

Multaj estis la aranĝoj, planitaj de l'Asembleo de la Paco. Fakte ne ĉiuj efektiviĝis, „la tempo estis nesufiĉa por tiom da iniciatoj“. La organizado tamen estis senripoĉa, aŭ kiel diras Pablo: „se, ekzemple, vi iras en iun lokon, kaj ne estas antaŭ la aŭtobuso en la difinita horo, vi preterlasas, ja la aŭtobuso ne atendas“.

Oni loĝigis la knabojn en la universitata urbeto, kie ili okupis la ĉambrojn de la studentoj liberajn dum la ferioj. La pli granda parto de la aranĝoj okazis en la Palaco de Kulturo, kien la infanoj venis kaj partoprenis en pentroartaj ekspozicioj aŭ muzikaj koncertoj. Pablo recitis unu versaĵon.

Ili vizitis ankaŭ aliajn interesajn lokojn — la Olimpikan stadionon, kie ili rigardis sportajn manifestaĵojn; Rila-monaĥejon, en kiu ili vidis ikonografan ortodoksan arton kaj la monumenton de sonoriloj, kie estas

diversaj sonoriloj, senditaj el la tuta mondo. Krom tio Pablo kaj aliaj hispanaj infanoj estis invitataj al la hispana ambasado, kie oni regalis ilin.

La artikolo estas skribita de Kovadonga Fernandez, kun foto de Pablo Sekades. Ĝi estas interesa por ni, ĉar esprimas la bonajn impresojn kaj sentojn, kun kiuj forveturis el Bulgario la hispanaj infanoj, partoprenintaj la Asembleon.

Bojana PRODANOVA

STUDENTOJ LERNAS ESPERANTON

Komence kaj fine de la pasinta lernojaro okazis renkontiĝoj inter la rektoro de la Ŝumena Supera Pedagogia Instituto prof. Kamenov kaj la prezidanto de Esperantista societo „Vekiĝo” — Ŝumen, lige kun la fakultativa studado de Esperanto. Prof. Kamenov favore pritaksis la problemon kaj proponis aranĝi tiun aferon dum la lernojaro 1988/1989.

Komence de la nuna lernojaro okazis denove simila renkontiĝo kun prof. Kamenov, kaj tuj poste kun lia unua anstataŭanto docento Ignatovski — respondeculo pri idea-eduka laboro en la sama Instituto kaj ili ambaŭ donis sian konsenton pri fakultativa studado de Esperanto en la Instituto.

Sekvis labor-renkontiĝo kun la dekanato de la Fakultato pri Sociaj Profesioj docento Luĉian Milkov. Surprize agrabla estis lia propono, ke la studado de Esperanto estu ne fakultativa, sed regula, kaj post sukcesa ekzameno la studentoj ricevu regulan ŝtatan diplomon kun dua fako „Instruado de Esperanto”.

Do, tio estas historia evento en nia Esperanto-movado.

La 26-an de oktobro 1988 estis solene malfermita la lernojaro 1988/89 kaj nun la fako funkcias unufoje semajne dum kvar horoj.

La programo antaŭvidas jenajn ekzamenajn studob-

jektojn: la lingvo Esperanto — dum la unua jaro, kaj Metodiko de Instruado de Esperanto — dum la dua jaro.

Krome la studentoj havos ankaŭ jenajn studobjektojn: Historio de la Esperanto-movado, Esperanta literaturo, Organizado de la Esperanto-movado, E-periodaĵoj. Studentoj partoprenos dum la vintra kaj somera feriado seminariojn en Pisanica kaj ISEU en Veliko Târnovo.

La studado de Esperanto daŭros du lernojarojn, entute 400 studhorojn.

La faklecio okazos en aŭditorio je la nomo de doc. Aksela Lazarova, kiu estis denaska esperantistino kaj docento pri filologio en la Supera Pedagogia Instituto en Ŝumen, tro frue mortinta. Ŝia patro, kontraŭfaŝisma aktivulo, estas fama esperantisto, kiu siatempe edziĝis kun finnlanda esperantistino kaj kreis esperantistan familion, en kiu naskiĝis Aksela. En tiu familio plej ofte uzata lingvo estis Esperanto.

Do, estas honoro studi en la aŭditorio portanta la nomon de nia karmemora Aksela. La studentoj scias tion kaj diligente lernas Esperanton kaj la historion de nia movado.

Profesoras Dobrinka Zagorova kaj Ĥristo Tonev.

Ĥristo TONEV

E-KLASO EN VILAĜO DOBROTICA



Jam pli ol unu jaron funkcias la E-klaso en lernejo „Ĥr. Smirnenski“, v. Dobrotica, (komunumo Antonovo en la departemento de Razgrad), fondita dum la jubilea jaro de Esperanto, la 6-an de oktobro 1987, pro la deziro de la gelernantoj lerni la Internacian Lingvon. Tiam entuziasmaj gelernantoj de la 6-a kaj 7-a klasoj proponis al la lerneja estraro la ideon krei tiun novan formon por plivastigi sian horizonton.

Kaj nun, post 1-jara aktivado la E-klasanoj organizis solenan kunvenon, dediĉitan al ilia „naskiĝtago“. Belaj murgazetoj altiris la rigardojn de la gastoj, kiuj kun intereso trarigardis la ekspozicion el diversaj Esperantaĵoj: bilkartoĵoj, poŝtmarkoj, insignoj k. a.

REGIONA FESTIVALO EN BLAGOEVGRAD

La 26-an kaj la 27-an de novembro en Blagoevgrad kolektiĝis amatoraj kantistoj, aktoroj, deklamantoj el la Esperanto-societoj en Sofio kaj Sofia departemento, por partopreni la Regionan Revuon de la E-Parolo kaj Kanto.

Genre la revuo estis riĉa — vice kun la tradiciaj partoprenantoj en tiuj festivaloj — korusoj kaj deklamokolektivoj, kantistoj kaj deklamantoj, aperis ankoraŭ pupteatro, satira kolektivo, kolektivoj plenumantaj popolkantojn. Tiu bunta spektro de diversaj ĝenroj respegulas la tendencon pri pliriĉigo de la esperantista amatora arto en nia lando per novaj formoj.

Bedaŭrinde, la kvalito en arta kaj lingva aspekto ĉiam ankoraŭ estas sub la dezirata nivelo. Nur unu ekzemplo ilustras tiun ĉi problemon — de la prezentiĝantaj tri deklamokolektivoj, nur unu meritis esti distingita, sed — per tria premio. Evidente, ankau ĉi-jare ne estas realigita la tiel necesa kunlaboro inter la gvidantoj de

La lernantino el la E-klaso Nina Angelova parolis pri Esperanto, pri la Bulgara E-movado kaj pri la grandaj zorgoj por disvastigo de Esperanto en nia lando fare de la ŝtato.

La ĉeestantaj gelernantoj kaj geinstruistoj estis raviĝitaj de la originala komponaĵo „Esperanto kaj nia bela Patrolando“. La belsonaj E-kantoj kaj riĉenhavaj poemoj forte emociis la publikon.

La „naskiĝtaga“ solenaĵo de „Verdaj Steletoj“ en Dobrotica estis vere granda festo por la junaj geesperantistoj kaj iliaj gastoj.

Antoaneta NIKOLAEVA

la amatoraj kolektivoj kun teatraĵoj, muzikaj, lingvaj, literaturaj specialistoj.

La revuo en Blagoevgrad starigis ankaŭ jenan demandon — ĉu tiuj festivaloj estas loko, kie povus prezenti sian arton en Esperanto ankaŭ neesperantistaj kolektivoj kaj plenumantoj, aŭ la aranĝo estas nur por esperantistoj? Tion oni devas klarigi ĝis la komenco de la Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Stara Zagora komence de aprilo, por ke ne estu miskomprenoj.

Por la ĉeestantoj estis prezentita la pusppektaklo „La urseto Rimĉimĉi“, per kiu la Ŝtata Pupteatro en Blagoevgrad partoprenis PIF-on en Zagrebo ĉi-somere kaj gajnis duan premion en tiu renoma internacia festivalo. Similaj programeroj ĉiam donas bonajn rezultojn, ĉar servas kiel mezuriloj por alta artnivelo.

Ljubomir ALEKSANDROV

Aŭtobiografia poezio



„Desislava ridetas“ (lirika poezio kaj satira prozo, originale verkita en Esperanto). Aŭtoro: Giorgio Silfer. Grafiko: Perla Ari Marinelli. Ilustraĵoj: Stella Agostini. Unua eldono, 71 p. Eldoninto: Kooperativo de Literatura Foiro, Genevo, Svislando, 1987.

Tiu ĉi libro apartenas al la „intelektula literaturo“, ekzemplo de alta stilo, kiun oni povas kompari nur kun la plej bonaj atingoj de la Esperanta literaturo.

La unua parto de la libro estas lirika. La aŭtoro kantas pri ĉio, kio ĝojigas aŭ dolorigas lian koron — pri amo, pri sia edzino, pri morto de la filo, pri pasio, ĵaluzo, beleco. Ĝenerale la poezio de Silfer estas melankolia, sed realisma! Ĝi sendube estas aŭtobiografia poezio.

La dua parto de la libro konsistas el satira prozo: „La paroj stultaj“ — dekdu anekdotoj proksimaj al la malgranda novelo, kaj „Kvin papavoj“.

En tiu ĉi libro estas ankaŭ unu rakonto — „Serĉi loĝejon en grandurbo“ — denove aŭtobiografia, en kiu la aŭtoro atingis plej altan lingvan nivelon.

La libro havas ion parencon al Bulgario. La titolo kaj la unua versajo mencias la nomon de la bulgara princino Desislava. En 1978 Giorgio Silfer vizitis nian landon kaj estis forte impresita de la „Giokonda de Oriento“.

Leginte la libron oni sentas la profundan sincerecon de la aŭtoro. Verŝajne ĝuste tio estas la kaŭzo, ke la libron oni legas per unu spiro. Mi jam faris tion. Kaj vi?

Ljubomir TRIFONĈOVSKI



ORLIN ORLINOV

AL MIA NEKONATA ARMENA FRATO

Vi, kiu paŝas nun sur via voj' jarcenta,
neatingante ĉiam vian Araraton,
ĉu vi, vestita jam en pulovero mia, ĉi-
momente
eksentos mian tutan amon fratan?

Mi scias, ke dum tiuj tagoj de ĝem-
krioj
ne estas ja balzamo mia pulovero,
sed se eĉ iomete ĝi varmigus vin, ho,
tiam —
ne vi, sed mi ne estos sola vere.

Tradukis: Venelin MITEV

Tiu armena patrino kun siaj 3 filinoj pasigis 40 horojn sub la ruinoj post la terura tertremo de la 7-a de decembro 1988. Nun ili, simile al multaj aliaj savitaj homoj, vivas duan vivon.

LINGVOLABORATORIAJ KURSOJ EN SZOMBATHELY

La 7—16.08.1988 en la hungara urbo Szombathely okazis lingvolaboratoriaj kursoj de Esperanto. Ilin partoprenis entute 68 personoj el Hungario, Sovet-Unio, Jugoslavio, Bulgario kaj Turkio. La bulgara grupo estis la plej multnombra. Ĝi konsistis el 26 gekursanoj kun gvidantino Cvetana Kostova.

La partoprenantoj estis dividitaj en tri grupojn: du por komencantoj kaj unu por progresintoj, kiuj okupiĝis ĉe bonaj kondiĉoj en la moderna Domo de la Kulturo. Aparte dece estis meblita la lingvolaboratorio — tute moderne, kun difinitaj lokoj kaj aŭskultiloj por ĉiu lernanto. La juna instruisto Nemeth Jozsef lerte gvidis la okupojn, kontaktante ĥore aŭ individue kun la tuta grupo. Ĉi tie oni havis eblecon ekzerciĝi en la lingvo, aŭskulti belegan muzikon kaj lerni novajn kantojn, la plimulto de kiuj estas kreitaj surbaze de hungara popola muziko. Veran plezuron faris al ni la hungaraj plenumantoj. Kun fiero oni aŭskultis surbendigojn de bulgaraj operkantistoj: Veselin Damjanov, Maria Angelova, Jana Cikalova, Dimităr Denĉev k. a. Tiel estis certigita unu el la plej necesaj pedagogiaj postuloj — agrableco, kiu akompanis nin ĝis la fino de la kursoj.



La bulgaraj esperantistoj, kiel la tuta bulgara popolo, elkore konsentas al la armena popolo en ĝia granda malfeliĉo kaj donas sian kontributon por helpi ilin.

Luj el ni unuafoje lernis la Internacian Lingvon. Sed dank' al altnivela laboro de ĉiu instruisto ili rapide faris grandan paŝon antaŭen kaj ekamis Esperanton. La ceteraj pliriĉigis kaj pliprofundigis siajn konojn kaj sciojn de la lingvo sub la sperta gvidado kaj pedagogia majstreco de s-ino Hompaszne Judit. Ŝi kreis bonegan amikan etoson, kiu permesis al ni libere, senĝene esprimi niajn pensojn, tute nature interparoli je diversaj temoj. La instruistino instigis la kursanojn paroli pri sia patrolando.

La instruado de ĉiuj instruistoj pasis flue, agrable kaj rezultodone, malgraŭ ke la studhoroj daŭris de la 8-a ĝis la 12-a horo kaj estis instruita granda gramatika kaj leksika materialo. Ofte parolado kaj kantado alternis. Tio faciligis kaj variigis la lernadon. Ni lernis serioze kaj amuze.

Aparte agrablaj estis ankaŭ la okupoj de d-ro Muranyi Peter, kiu, krom per siaj bonegaj klarigoj, plezurigis la kursanojn per sia belsona voĉo.

Sekvas la demando — ĉu nia restado en Szom-

bathely estus tiel agrabla sen la konstantaj zorgoj de s-ro Grecyi Istvan? Ni multe ŝuldas al li.

Multon faris por la tuta kurso la estimata prezidanto de DK de Vaŝ, d-ro Tülöp Jozsef. Sub lia kompetenta gvido ni ekkonis kaj ekamis la belegan urbon Szombathely kun ĝiaj memorindaj vidindaĵoj kaj atingiĵoj. Dank' al li kaj ĉiuj esperantaj amikoj ni ricevis abundajn impresojn pri la riĉa historio kaj nuntempa vivo de la antikva, sed samtempe moderna urbo Szombathely.

La afablaj dommastroj organizis por ni neforgeblajn ekskursojn. Ni plezure ĝuis la belecon de la urboj Kjosek kaj Sarvar, profunde spirante la kristale puran aeron de la unua kaj naĝante en la mineralakvaj basenoj de la dua. Interesa estis ankaŭ la granda preĝejo en vilaĝo Jak. Sed krono de niaj travivaĵoj estis la tagoj, pasigitaj en la perlo de Danubo — Budapeŝto. Mi rezignas skribi pri ĝia nepriskribebla beleco. Ĝi restos kiel bela fabelo en niaj koroj kaj memoro.

Cvetana KOSTOVA

LA E-MOVADO EN SVEDIO PROGRESAS

La E-kursoj en Kungälv (8—12 de aŭgusto ĉi-jare), organizitaj por kvara fojo, estas ĝojiga fakto en la sveda E-movado. Ĉirkaŭ 70 partoprenintoj el Svedio, Norvegio, Burundio, Bulgario, Pollando, Litovio, Nederlando kaj Turkio partoprenis la riĉenhavan programon — agrablan kaj utilan por ni ĉiuj.

La grupoj por E-lernado estis kvin: por komencantoj kun gvidanto Joachim Werdin, Pollando; daŭriga por personoj iom sciantaj Esperanton — Bernard Nzanyie, Burundio; daŭriga por personoj bone sciantaj Esperanton — Andrzej Pettyn, Pollando; konversacia — Libertaria Mladenova, Bulgario; pedagogia — Audrey Childs-Mee, Nederlando.

Ege interesaj estis la prelegoj (ekster la instruhoroj) de Andrzej Pettyn (Pollando): „La E-elsendo de Radio „Polonia“ kaj de J. Werdin pri psikotroniko kaj ankaŭ pri lia venontjara vojaĝo tra Azio, celanta studon de la nuna stato, bezonoj kaj problemoj de la azia E-movado. Kaarlo Voionmaa, finno, lingvisto ĉe la Universitato en Gotenburgo (Svedio) prelegis pri temo: „La lingvo kaj la identeco: kiel Esperanto influas al ni?“ kaj surbaze de ĝi okazis debata vespero.

Kaj kion ni diru pri la bulgara partopreno? Libertaria Mladenova estis ŝatata de siaj gekursanoj kaj akiris tre altan pritakson fare de siaj gekolegoj. Mariana Elenova estis invitita de la organizantoj por respondi pri la kulturprogramo kaj partopreni en ĝi. Ŝi kontribuis al la bona humoro de la ĉeestintoj. Dum la Interkona Vespero ŝi kantis ciganajn romancojn en Esperanto. La Debata Vespero komenciĝis per „Nia kara patrolando“ kaj finiĝis per la popola kanto „Sur Pirin-montaro“, ambaŭ plenumitaj de M. Elenova (cetere dum la vespero estis plenumita po unu kanto en sveda kaj finna lingvoj). Dum la Adiaŭa Balo ŝi prezentis du kantojn de Edit Piaf — en franca kaj en Esperanto, kaj kune kun Libertaria Mladenova — instruis al la ĉeestantoj du bulgarajn popoldancojn: „Râčenica“ kaj

„Pravo ĥoro“... „Iom pri la bulgara literaturo. Lastaj E-libroj, eldonitaj en Bulgario“ estis la titolo de prelego de M. Elenova, kiu koncize rakontis pri la personeco kaj verkaro de Ĥristo Smirnenki, Nikola Vapcarov, Georgi Karaslavov kaj Ĥristo Radevski. Sub muzikfono ŝi deklamis „Fabelo pri la ŝtuparo“ de Ĥr. Smirnenki kaj „Ĝis kiam juna estas vi“ de Ĥr. Radevski. Fine ŝi enmanigis la prezentitajn librojn al M. Andréasson kiel donacon de BEA al la E-klubo en Gotenburgo.

Valoras mencii la mirindan ekskurson al belega Gotenburgo kaj la emocian viziton al ties amuzparko Liseberg! Kaj ankaŭ — la intiman, agrablan etoson dum la renkontiĝo inter la eksterlandaj gastoj kaj anoj de la E-klubo en la sama urbo.

Fine de la kursoj la ĉeforganizantino Martha Andréasson dividis:

„Mi tre ŝatas la kunlaboron kun BEA. La intereso al nia kurso estas pli granda, kiam svedoj scias, ke partoprenos bulgaroj. Ankaŭ pri partopreno de svedaj esperantistoj en Pisanica mi povas diri, ke ĉiuj ĉiam estis kontentaj. Jes, mi ŝatus daŭrigi tiun kunlaboron“.

Mariana MIĤAJLOVA

ĈE LA RIVERO AGIDEL...

En aprilo pasintjare okazis en la Baŝkira Medicina Instituto en u. Ufo (USSR) la 53-a Scienca Konferenco. La konferenco inkluzivis 26 fakajn sekciojn, inter kiuj estis ankaŭ la sekcio „Esperanto serve al paco kaj medicino“. Ĉi-sekcion partoprenis sciencistoj, medicinistoj kaj studentoj krom el u. Ufo, ankaŭ el Moskvo, Vladimir, Perm, Salavat k. a. El Bulgario ĉeestis du reprezentantoj. La demandoj, prelegoj kaj diskutoj estis nur en Esperanto. Post la kunveno okazis renkontiĝo en la rektorejo. La rektoro prof. F. H. Kamilev kaj la aliaj interesiĝis pri Esperanto, pri ĝia uzo en la mondo, pri la ebleco enkonduki ĝin por medicinaj celoj, por interproksimigi la profesiojn, spertoŝanĝon kaj komunikadon.

Ufo estas la ĉefurbo de la Aŭtonoma Soveta Socialisma Respubliko Baŝkirio, kie loĝas kaj laboras pli ol 1 miliono da homoj. La urbo situas sur la maldekstra bordo de rivero Belaja, kies malnova nomo estas Agidel.

Parolante pri Ufo oni ne devas forgesi la muzeon de Vl. I. Lenin. Vivaj estas en tiu urbo ankaŭ la memoro kaj estimo al nia Georgi Dimitrov.

En Ufo estas tre aktiva kaj vigla Esperanta klubo. Ĝi disponas pri aparta ĉambro kaj salono en la Palaco de Kulturo ĉe la Uzino pri Kaŭĉukaj Teknikaj Produktaĵoj. Ĉi tie oni organizas kursojn de Esperanto, amuzvesperojn, diversajn renkontiĝojn. La aranĝojn ofte ĉeestas ankaŭ neesperantistoj. Oni prelegas, diskutas, kantas, projekcias filmojn. Kaj ĉiam oni parolas esperante! La progresintoj perfektigas, la komencantoj adoptas la ĉiutagan lingvouzon.

Dum la tagoj de la medicina konferenco okazis kel-
kaj renkontiĝoj en Ufa E-klubo. Estis amuzvespero
kun la studenta esperantista pacgrupo, parolado pri
Zamenhof kiel kuracisto, homo kaj kreinto de Espe-
ranto, projekciado de diapozitivoj — nia amiko Boris
Kolker detale rakontis pri la 63-a Universala Kongreso
en Varna — 1978, poste oni multe parolis pri nia lan-
do.

La sekvantan matenon, frue, kiam la suno apenaŭ
leviĝas, la trajno ekveturis el u. Ufo, trapasis la feran
ponton sur la rivero Agidel. Sur la ondoj glitis boatoj
de fiŝkaptistoj. Vaporŝipetoj fajfante sciigis pri sia ek-
zistado!

Adiaŭ Ufo! Adiaŭ Agidel!

Prof. d-ro Kiril POPOV

ADRESARO

(Daŭrigo de n-ro 1/1989)

DEPARTEMENTO DE LOVEĈ

5500 Loveĉ
Str. Dimităr Pâškov 22
Asen Matev
E-societo „Espero”

5800 Pleven
Str. Canko Cerkovski 14
Vâlka Dobрева
E-societo „Eterna Amikeco”

6572 Borima
Stanĉo Kraev
E-societo „Nova Mondo”

5570 Letnica
Str. Stanke Dimitrov 8
Dobrina Miševa
E-societĉ „Rivero Osâm”

5770 Lukovit
Obŝtinska bolnica
d-ro Kosta Cenov
E-societo „Medicina laboristo”

5540 Stojanovo
Enĉo Pejkov Martinov
E-societo „Nato Canov”

5600 Trojan
P. K. 90, Pavel Pajmakov
E-societo „Balkana Stelo”

5870 Dolni Dâbnik
Str. Neftenik 19
Penko Petkov
E-societo „Espero”

5960 Guljanci
Sneĵana Marinova
E-societo „Floro”

5900 Levski
Partia Domo
Stanka Toševa
E-societo „Trumpetisto”

5940 Nikopol
Str. Elija 59
Leverica Najdenova
E-societo „Petko Simeonov”

5878 Petârница
Svetla Danova
E-societo „Zaĥari Iliev”

5868 Pelovo
Obŝtinski Komitet na OF
Ganĉeva
E-societo „Pacbatalantoj”

5898 Pordim
Ĉitaliŝteto — Det. Petkova
E-societo „Verda Stelo”

5842 Koilovci
Osnovno uĉiliŝte
Nikola Vasilev
E-societo „Ora Spiko”

3270 Kojnare
Osnovno uĉiliŝte
Toto Kânĉovski
E-societo „Veselin Damjanov”

5980 Ĉerven Brjag
Obŝtinski naroden sâvet
Nadeĵda Georgieva
E-societo „Vasil Gazovski”

5300 Gabrovo
P. K. 10, Marija Avramova
E-societo „Verda Torĉo”

5370 Drjanovo
Str. „12 juni” 17
Geno Manev
E-societo „Ivan Vladkov”

5400 Sevlievo
Str. V. Levski 3
E-societo „Frata Stelo”

5350 Trjavna
Str. Geörgi Dimitrov 107
Radka Liĉeva
E-societo „Verda Standardo”

5000 Veliko Târnovo
P. K. 226
Angel Nedjalkov
E-societo „Lumo”


5070 Elena
Str. Il. Momĉilov 59—A
Sava Petkov
E-societo „Verda Balkano”

3230 Kneĵa
Str. Ĥr. Botev 19
Boris Gorniŝki
E-societo „Agro”

3220 Kozloduj
Mladeĵko obŝteĵitie 1
staja 1103, Dimo Boĵkov
E-societo „Ĥr. Botev”

3300 Orjaĥovo
Str. Sofijska 14
Nadeĵda Bosaŝka
E-societo „Georgi Stanev”

(Daŭrigo en n-ro 3/1989)



Enlanda movado

KONFERENCO DE KOLEKTANTOJ

Unu el la aktivaj sekcioj de Bulgara Esperantista Asocio estas la Sekcio de Kolektantoj. Preskaŭ ĉiu esperantisto pli aŭ malpli kolektas esperantaĵojn. La Sekcio penas helpi kolektemulojn, instruante al ili la ĉefajn regulojn kaj postulojn de kolektado. Ĉio ĉi kaj la sekcia aktivado estis la ĉefaj temoj de la sekcia konferenco, okazinta en septembro 88. Dommastro de la aranĝo estis la E-societo en urbo Srednogorie. Ĝia prezidanto Ilija Iliev kaj kelkaj aliaj geaktivuloj multon faris, por ke la trideko da partoprenantoj el deko da urboj povu bone konferenci. Ni kunsidis en konvena kaj agrabla salono en la Domo de Tekniko. La sekcia prezidantino Zora Ošanska skizis la lastjaran agadon de la Sekcio kaj parolis pri antaŭstarantaj kaj farendaj aferoj.

Cvjatko Todorov el Ŝumen prelegis pri temo „Arta valoro kaj historia signifo de la poŝtmarkoj”: d-ro Milčo Vasilev kaj Ljuben Ljubenov, estraranoj de la Bulgara Filatelista Asocio, prelegis pri temoj: „Estetika formado de la poŝta koverto kaj signifo de la unuataga stampilo” kaj „Kontribuo de la kolektanto al la idea, estetika, patriota kaj internacia edukado de la generacioj”. Nikola Nikolov el Sofio parolis pri temo „Kia devas esti la kolektanto-esperantisto”.

Okazis viglaj diskutoj esperante aŭ bulgarlingve. Oni esprimis sian opinion kaj faris proponojn pri plibonigo de la Sekcia agado.

Ni havis sufiĉe da tempo por trarigardi kaj komenti la belajn, interesajn kaj lerte aranĝitajn eksponaĵojn: bankbiletoj kaj moneroj, esperantaĵoj, insignoj, kupraj ardaĵpotoj por varmigo de ĉambroj k. a. La ekspozicio meritis esti prezentita al la atento de la urbanoj. Tio estus ankaŭ maniero vekii intereson al niaj lingvo kaj movado.

La turista koruso de Srednogorie kantis por ni belajn turistajn kaj popolajn kantojn. La partoprenantoj metis freŝajn florojn ĉe la memortabulo, kie estis la domo de la aktiva esperantisto kaj akademiano Ivan Krestanov. Dum la ekskurso al barajlago „Duŝanci” ni ĝuis belajn vidaĵojn kaj, nature, mallongigis la tempon, parolante pri problemoj de la Sekcio kaj pri specifaj trajtoj de la esperanta kolektado.

Similaj aranĝoj estas tre necesaj kaj utilaj. Ili ebligas al la ĉeestantoj pli bone ekkoni unu la alian kaj esprimi senĝene siajn pensojn kaj vidpunktojn. Ege bedaŭrinde estas, ke iuj partoprenantoj anstataŭ ekskursi rapidis al la fervoja stacio, por forveturi hejmen.

La novelektita sekcia estraro kun prezidanto s-ino Svetlana Stratieva promesis aktive labori kaj plenumi la decidojn de la konferenco.

N. N.

MEDICINISTOJ AKTIVAS

En la kuraĉloko Bankja fine de 1988 okazis Nacia Konferenco pri la Problemoj de Amasa Profilaktiko kaj Higiena Vivmaniero, organizita de kelkaj institucioj sub la patroneco de la Patrolanda Fronto.

La Konferencon partoprenis ankaŭ medicinistoj-esperantistoj el la tuta lando. En aparta kunsido ili aŭskultis en Esperanto prelegojn kaj scienc-praktikajn anoncojn pri la konferenca temo. La prezidanto de la Medicina Sekcio ĉe BEA prof. d-ro Kiril Popov rakontis pri la komenciĝinta renovigo en BEA kaj starigis la konkretajn taskojn por 1989. D-ino Maria Lukanova, organiza sekretario de la Sekcio, informis pri la kunveno de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) enkadre de la Universala Kongreso en Roterdamo (Nederlando) kaj pri la Sepa Internacia Medicina Esperanto-Konferenco (IMEK), kiu okazos en 1989 urbo Uortrijk (Belgio).

Estis tralegita salutletero de la prezidanto de UMEA d-ro Imre Ferenci al la partoprenantoj en la Konferenco.

La plej aktivaj bulgaraj medicinistoj-esperantistoj estis distingitaj per atestiloj kaj insignoj de UMEA.

D-rino Ljudmila KOSTOVA

ESPERANTO EN

... FABRIKO

La 23-an de septembro 1988 en montodomo „Meĉkovica”, situanta en la pitoreska sino de Balkanmontaro, apud u. Gabrovo, okazis solena Esperanta vespero. Ĝin partoprenis gelaboristoj el fabriko „Tekstilmaŝ” — Gabrovo.

Jam de du jaroj en la fabriko, sub la sperta gvidado de la esperantistino Maria Ivanova, funkcias Esperanto-rondo. Dum la pasinta lernojaro estis organizita kurso por komencantoj.

En la riĉa artprogramo partoprenis gekursanoj, kiuj sukcese finis unuan gradon.

K-do inĝ. Mandev — la kursgvidanto, disdonis la atestilojn kaj bondeziris al ĉiuj dum la nova lernojaro 1988/89 sukcesojn kaj viglan korespondadon por disfamiĝi eksterlanden la produktaĵojn de fabriko „Tekstilmaŝ”.

... LERNEJO

La 13-an de oktobro 1988 en baza lernejo „N. Vojnovski” — Gabrovo, estis solene malfermita la nova lernojaro en la junpionira organizaĵo.

Ĉe la Klubo por internacia Amikeco jam duan jaron funkcias Esperanto-grupo. La gelernantoj diligente lernas Esperanton kaj jam havas amikojn en Ĉinio, Nijnevarovsk, Hindio, Brazilo, Vjetnamio, Kanado, Togolando k. a. La konstanta murgazeto en la lernejo kun esperantaĵoj ricevitaj de la gekursanoj altiras la atenton de ĉiuj.

Ĉi-somere la grupo feris en Hungario. La infanoj ĝuis la Balaton-lagon, kaj la mezepokan kastelon, en kiu ili loĝis kaj en kiu estis organizita la Esperanto-tendaro. Ĉiuj deziris pli longan restadon en urbo Aband.

Ĉiuj praktike spertis la rolon de la internacia lingvo.

St. TOTEVA

KONCIZE

GABROVO. La 3-an de novembro 1988 en la Verda Salono de la Domo de Kulturo okazis vespero dediĉita al E-veteranoj.

La prezidantino M. Avramova donis la parolon al B. Prodanova. Ŝi prelegis pri la agado de esperantistoj el Gabrovo-regiono antaŭ la 9-a de Septembro 1944.

Unua prezidanto de la E-societo estis Vasil Tabakov. Aktive laboris Ljubomir Avramov, Stojan Ivanov, Ivan Ŝkodrov, Nikolaj Peŝkov k. a. 25 esperantistoj pereis en batalo kontraŭ la faŝismo.

Post la prelego E-veteranoj rakontis rememorojn. Fine al la veteranoj estis disdonitaj floroj kaj donacoj.

Sonja TIHOVA

KARNOBAT. La 3-an kaj la 4-an de decembro 1988 en urbo Karnobat, departemento de Burgas, okazis Unua Departementa Pedagogia Seminario kun partopreno de E-lektoroj ĉe la esperantistaj societoj en Burgas-departemento.

Sub la gvidado de Elena Stojkova, Janka Ilieva kaj Svetla Ĥristova la partoprenantoj lernis kantojn kaj didaktikajn ludojn, necesajn en la proceso de la E-instruado en lernejoj kaj kursoj por civitanoj.

Estis pridiskutitaj orgnizaj demandoj lige kun la organizado de kursoj, okazigo de ekzamenoj ktp.

E. BALEVSKA

RUSE. La 18-an de oktobro estis organizita emocia memoriga solenaĵo omaĝe al la patrono de nia Klubo de la Veteranaj Esperantistoj „Djanko Stefanov” ĉe E-societo „Libero” — Ruse. La juna esperantisto Djanko Stefanov, kiel sekretario de la tiutempe eksterleĝa Bulgara Komunista Partio, estis kruele mortigita de la faŝistoj antaŭ 45 jaroj (7.10.1943).

Jordan KALINOV

STARA ZAGORA. La Esperanto-Domo de Kulturo en Stara Zagora estas malfermita nur antaŭ kvin monatoj, sed ĝi jam fariĝis vera centro de interesaj aranĝoj. Ĉe la Domo funkcias kvar kluboj: „Fervojisto”, „Klereco”, „Areno” kaj „Asen Zlatarov”.

Nia kulturprogramo proponas al la partoprenantoj diversspecajn aranĝojn, kiuj okazas ĉiunmerkrede je la 18.30. horo.

Nejko ATANASOV

Organo de Kolektivo Esperantista Komunista (KEK) „Internaciisto” aperas 6-foje jare. Jara abonkotizo: 3 levoj.

Redakcio: A-8704 LEOBEN — Aŭstrio.
Ĉiujn informojn donas por Bulgario — KEK. P. K., 25, 1309, Sofio.



VII ISEU

De la 15-a ĝis la 21-a de julio 1989 en Veliko Târnovo, Bulgario, en la loka universitato „Kiril kaj Metogij” okazos la Sepa Sesio de la Internacia Somera Esperanto-Universitato (ISEU).

Prelegos eminentaj bulgaraj kaj alilandaj sciencistoj kaj specialistoj-esperantistoj.

Celo: plialtigo de la ĝenerala kulturo kaj lingva nivelo de la partoprenantoj.

Aliĝkotizo: por fremdlandanoj — 90 levoj, pageblaj surloke, kaj por bulgaroj — 65 levoj, pagado nur per poŝtmandato. La kotizo inkluzivas loĝadon en la renovigitaj studentaj komunloĝejoj, trifojan ĉiutagan manĝadon, interkonan vesperon, eksterurbajn ekskursojn k. a. Ĉiu organizanto de 10-persona grupo partoprenas en ISEU senpage.

Limdato por aliĝo — 30.06.1989.

Aliĝilojn kaj programojn bonvolu peti de: Esperantista societo „Lumo”, P. K. 121, 5000 Veliko Târnovo — Bulgario.

La sama adreso validas por sendado de poŝtmandatoj.

Organiza Komitato

EKSPOZICIO ORGANIZOTA

Celante propagandi la internacian lingvon Esperanto en lernejoj kaj kontribui al plifortigo de la amikeco inter infanoj, nia lerneja Esperanto-klubo organizas cirkuligeblan ekspozicion de infanaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj: „Per Esperanto por mondpaco kaj amikeco!”

Ni estus ege dankaj, se vi publikigus la anoncon pri nia organizota ekspozicio.

Desegnaĵojn, pentraĵojn kaj petojn pri la ekspozicio ni atendas ĝis la 10-a de aprilo 1989. Nia adreso: Esperanto-klubo „Stela Papageto”, Pionir-palaco, str. Paleckio 43, 236000 Vilnius, Litovio, USSR.


JUNULARA ARANĜO EN SOVETUNIO

De la 29-a de marto ĝis la 5-a de aprilo 1989 ASE kaj ĝia Junulara Komisiono organizas la 2-an Internacian Sovetian Esperantistan Junularan Tendaron — Inter SEJT'89 en la turista centro „Juneco” de buroo „Sputnik” en Minsk, ĉefurbo de Belorusio.

Ni invitas la esperantistojn el diversaj landoj partopreni ĉi tiun aranĝon. Ili anticipu kontakto la reprezentantojn de „Sputnik” en sia lando kaj pagu la restadkostojn (loĝado kaj manĝado) laŭ indikita de „Sputnik” prezo. La organizkotizon — sumo egala al dutaga restado en „Juneco”, oni pagu al la organiza komitato ĉe la alveno en Minsko.

Ni petas la partoprenantojn anticipu sin anonci ĉe landaj E-asocioj por veturi grupe, aŭ informi nin, okaze de foresto de grupo el la koncerna lando, por ke ni sciu per kia prelego pri ajna temo aŭ koncerto la gastoj povas kontribui al la programo.

Junulara Komisiono de ASE



Deziras korespondi

BULGARIO

RUMJANA GEORGIEVA (30-jara) — 1373 Sofio, bul. „St. Lepoev“, bl. 25, ap. 41 — kun ĉi pri ĉt.

TEODORA KRĀSTĒVA (49-jara, instruistino) — 5000 Veliko Tŕrnovo, str. „L. Karavelov“ 43-a, p. k. 3 — kun ĉi pri ĉt.

ZORNICA NIKOLOVA (18-jara) — 1289 Sofio, kv. Mirovjane, ul. „Kapitan Gastelo“, 8 — kun ĉi pri moderna muziko kaj historiaj romanoj.

ILIAN GONGALOV (18-jara) — 1680 Sofio, ĵ. k. Borovo, ul. „Nevestina skala“, 27, bl. 14, vĥ. V, et. 3 — kun ĉi pri ĉt, prefere kun Pollando, Japanio kaj Hispanio.

RADOSTINA PETROVA (14-jara) — Sofio, ĵ. k. Mladost — 2, bl. 226, vĥ. B, et. 3, ap. 31 — kun ĉi pri ĉt.

SVETLA NIKOLOVA (33-jara) — 1309 Sofio, ul. „Todor Ikonov“, bl. 132, ap. 110 — kun ĉi pri ĉt.

La Esperanto-biblioteko en vilaĝo Krŕn — 6140, distrikto Ĥaskovo, kolektas ĉiuspecajn novajn kaj malnovajn E-librojn, revuojn, gazetojn, lernolibrojn, leterojn, fotojn. Sendi senprokraste.

POLLANDO

DANUTA CEGLAREK (30-jara) — 64-400 Miedzychod, ul. Gwardii Ludowej 4 B m 11 — kun esperantistaj geedzaj paroj, bone posedantaj la lingvon, el ĉi pri ĉt.

KRZYSZTOF DUSIK (34-jara, teknikisto) — 34-500 Zakopane, ul. Goszczynskiego 22A — kun ĉi pri turismo, literaturo kaj lernado de fremdaj lingvoj. Kolektas lernolibrojn de fremdaj lingvoj kaj malnovajn E-revuojn.

DANUTA JEDINAK (37-jara, farmaciistino) — 47-220 Kedzierzyn-Kozle, ul. Leszka Bialego 1A/13 — kun ĉi pri ĉt.

BARBARA WALASRWK (24-jara, studentino) — 43-300 Bielsko-Biala, str. Kazimiera Wielkiego 28/5 — kun ĉi pri muziko, literaturo kaj turismo.

MARIA OLKUSKA (32-jara) — 09-412 Proboszece — kun ĉi pri turismo, muziko, fotografio. Kolektas tekstojn de kanzonoj, muziknotojn, fotoalbumojn, mapojn, gvidlibrojn.

ESPERANTA MEDICINA SEKCIO ĉe la Silezia Medicina Akademio serĉas kontaktojn kun gestudentoj aŭ gekuracistoj el ĉiuj landoj — 40-952 Katowice, ul. „Poniatowskiego“ 15, Slaska Akademia Medycina, Sekcja Esperantystów.

JACEK GOLEDZINOWSKI (32-jara oficisto) — 86-200 Chemno, ul. „Poprzeczna“ 2 — kun ĉi pri turismo kaj filatelo.

ĈEĤOSLOVAKIO

HANA REJMANOVA (60-jara muzikistino) — 54201 Źaclĕř, str. Mirovŕ 359 — kun ĉi pri ĉt.

PETR HEJNA (35-jara vendisto) — 54201 Źaclĕř, str. Źul. Fuĉka 83 — kun ĉi pri ĉt.

JARMILA STEPANOVA (60-jara kudristino) — 54201 Źaclĕř, str. Komenskĕho 280 — kun ĉi pri ĉt.

EDELTRAUD MINARIKOVA (45-jara dommastroino) — 54201 Źaclĕř, str. R. armŕdy 61 — kun ĉi pri ĉt.

GERD KUBIKOVA (45-jara oficistino) — 54201 Źaclĕř, str. R. armŕdy 30 — kun ĉi pri ĉt.

RUŹENA SPORNIKOVA (58-jara vendistino) — 54201 Źaclĕř, str. Mirovŕ 360 — kun ĉi pri ĉt.

GDR

MANFRED STRIEWSKY (38-jara instruisto) — 3038 Magdeburg, Bruno-Taut-Ring 66 — kun ĉi pri ĉt. Kolektas PM, bildkartojn kaj receptojn por kuirado.

HUNGARIO

BARATH LAJOSNE (33-jara, instruistino) — 6447 Felsŕszentivan Szabadsag u. 53 — kun bulgaraj geesperantistoj pri ĉt.

MONIKA NAGY (19-jara) — 5932 Gadoros, Beke tez. 10 — kun samaĝuloj el ĉi pri Esperanto, muziko, literaturo.

NI KONDOLENCAS

La 5-an de marto 1988 forpasia *Bonka Minĉeva Mandeva*, naskita en Sevlievo la 10.10.1927. Ŝi estis fervora esperantistino, multjara sekretario de la Sevlieva esperantista societo „Fratiga Stelo“, membro de la Centra Estraro de BEA kaj de la distrikta estraro. Bonka Mandeva gvidis kursojn de Esperanto kaj ŝia lasta kurso restis nefinita.

...

Jordan Peev Bogdanov, veterana esperantisto, naskita en 1894 en Gabrovo, forpasinta la 26-an de februaro 1988. Li aktive laboris por disvastigo de Esperanto ĝis la fino de sia vivo. Jordan Peev estis nia plej maljuna esperantisto, honora

membro de E-societo „Verda Torĉo“ — Gabrovo.

...

Boris Jordanov Birov, naskita la 15-an de februaro 1903 en vilaĝo Gradevo, Blagoevgrada regiono forpasis la 12-an de junio 1988 en Gabrovo. Li estis nia aktiva kunlaboranto, multjara kasisto kaj membro de la estraro de la E-societo „Verda Torĉo“. Li vizitis kelkajn naciajn kaj universalajn kongresojn, interesiĝis pri la Esperanta agado en nia urbo kaj en la lando.

...

La 8-an de oktobro 1988 forpasis ĉe akcidento dum la lerneja praktiko nia juna, 18-jara esperantisto *Velian Baev Peĥli-vanov*.

Ni estime kliniĝas antaŭ ilia hela memoro!

Esperantista societo „Verda Torĉo“

...

Irina Markova (1906-1988), multjara aktivulino kaj iama prezidantino de Esperanto-societo „Verda Stelo“ en Stara Zagora, forpasis la 13-an de novembro 1988.

Ĝis la lasta tago de sia vivo samideanino Markova estis entuziasma kaj fidela esperantistino.

Niajn kondolencojn al ŝiaj familianoj.

Esperanto-Domo de Kulturo — Stara Zagora
Esperanto-societo „Verda Stelo“ — Stara Zagora



Distroj

AMUZA ZODIAKO



AMFORO
(21.01—18.02)

*Zodiako ĉi danĝeras kaj imponas —
Ĝi al si similajn bone konas!
Amforanoj mokas mondeventojn,
tranĉas vorte kvazaŭ per segdentoj.*

*Al estonto foren ili vidas!
Ties faron homamas' avidas!
Ili tre fidelas al amikoj,
savas ilin en la zorgkomplikoj.*

*Ili ŝajnas oficej' priserva,
por la aliuloj nur pretverva...
Venkas plej penigajn vivproblemojn,
etaj, grandaj ĝuas komplezemojn.*

*Kore ĉion ja al vi donacas,
do, por si mem nek centimon lasas.
Eĉ genioj tie amasiĝas,
ve, de homoj ne tuj kompreniĝas.*

*Kaj reformojn gravajn tro estigas —
lumon al la homoj satcertigas!
En privata viv' ne bonŝancemas,
sed honestas, bonas, laboremas.*

*La liber' unualoke staras —
bonus ja al vi, se tio klaras!
Kun Leon' tuj interkompreniĝas,
se al ĝi moktrompo ne lanĉiĝas!*

Esperantigis: Asen JOSIFOV

POST LA LOTUMADO


Ĉi-foje la libropremion gajnis Georgi Miĥajlov el Sofio, kiu nun laboras en Irako. Ni sendis al li la libron „Mia trezoro“ de la veterana esperantisto Ivan Ŝivarov — pro la malkovritaj kaj priskribitaj diferencoj en du similaj desegnaĵoj, publikigitaj en n-ro 10/1988 de „Bulgara Esperantisto“. Gratulojn, s-ano Miĥajlov!

Ni dankas pro iliaj respondoj ankaŭ al gesamideanoj: Milan Smělý (Ĉeĥoslovakio), D-ro med. Otto Kaczinski (GDR), Miĥail Trumpe, Vitalij Rjabov, Vjaĉeslav Bragin, Vjaĉeslav Semjonov (USSR).

Korekte respondis ankaŭ la bulgaraj legantoj: Ĥristo Tonev (Ŝumen), Dimităr Gavrilov (Loveĉ) kaj Rosica Georgieva (Pazarĝik). Dankon!

„BE“

NIA VORTENIGMO



1. Gardo, protekto. 2. Ne voli scii, intence ne atenti, konscie preterlasi (radiko). 3. Maŝinpeco, kiu portas la akson aŭ ŝafton de rado aŭ de transmisia meĥanismo. 4. Nomu de diversaj gradigitaj instrumentoj por mezuri la enhavon de ujo. 5. Malgranda fako kun flankaj septoj kaj kelkaj seĝoj por spektantoj en teatro. 6. Tuto de la disĉiploj de unu filozofo, artisto, sciencisto ktp, kiun ili regardas kiel sian majstron. 7. Kvanto da varoj, krudmaterialoj aŭ fabrikaĵoj, disponeblaj en magazeno aŭ deponejo. 8. Genro de grandaj, primitivaj birdoj senkarnaj, kun longaj kolo kaj kruroj, kun nur du piedfingroj sur ĉiu piedo, nekapablaj flugi, sed tre rapidkuraj, vivantaj en Afriko. 9. Montara ĉeno, inter Eŭropo kaj Azio. 10. Ringoforma insulo, formita de koraloj, kun centra lageto kaj zono de rifo. 11. Plej malvasta parto de la homa korpo inter la subo de la brusto kaj la koksoj. 12. Filo de Dedalo, kiu flugante tre proksime al la suno perdis siajn vaksflugilojn kaj falis en la maron. 13. Teatra verko.

Dimităr HAĜIEV

Noto de la Redakcio: La solvojn de la vortenigmo ni atendas ĝis la 15-a de majo 1989. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 7/1989 de „Bulgara Esperantisto“.

815

ISSN—02—04—8701

